

RO

on, inter-
ni deziras

ika- kaj
spitaloj
niĝintoj;
uratorioj;
—entute
erkulozo

al ĉiu.
Estraroj
konigi
oroj kaj
nkaŭ al

acio de
laboras
oj kaj

0,

Revo

ESPERANTO

Internacia

N-RO 555 (2) FEB. 1952



(foto : Reece Winstone)

Printempaj krokusoj ĉe la katedralo en Hereford, Anglujo
(vidu paĝon 34)

INTO-ASOCI

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 555 (2)

Februaro 1952

OSLO,

la urbo de la Tridek-sepa Kongreso

Ja, ni amas ĉi tiun landon . . .

Oni diras, ke la plej bonaj dom-estrinoj estas tiuj pri kiuj oni ne parolas aŭ kiuj ne paroligas pri si. Tiun ĉi diraĵon oni povus ankaŭ apliki iom alisence al URBOJ kies nomojn oni ne aŭdas ĉiutage en la radio, kiuj ne paroligas pri si pro skandaloj okazantaj, kie ne naskiĝis centoj da famaj personoj, sed kiuj evoluigas senbrue. Oslo, la norvega ĉefurbo, apartenas al tiaj lokoj kaj ĝi gastigas nunjare la 37-an Kongreson de Esperanto. Ĝi havas unu avantaĝon jam pro la nomo kiu sonas agrable kaj facile adaptiĝas al nia lingvo.

Ankoraŭ en pasinta jarcento la nordaj landoj, kiujn ni nomas skandinavaj, ne altiris grandan atenton. Kiam la moderna turismo apenaŭ komenciĝis nur bonhavaj personoj povis entrepreni vojaĝon en la nordo. Tio esence ŝanĝiĝis. La malkovro de la norda beleco, la pli facila trafiko, la moderniĝo ĝenerala igis, ke la skandinavaj landoj fariĝis celo turisma. Ne laste la grandaj sociaj atingiĝoj formas rekomendleteron ne facile anstataŭeblan. Hele el la nordo brilas la lumo de la libereco: tiu ĉi konstato ne estas

nura flataĵo.


Oslo, la origina nomo de tiu ĉi urbo, ja ne brilas per ŝtonaj monumentoj el pasintaj epokoj. Ĝi ankaŭ ne estas miljara sed "nur" naŭcent—do inter la ĉefurboj relative juna. La sendependiĝo de Norvegujo en 1905 grade kontribuis al la seninterrompa evoluo de estinta Christiania, kiu el provinca loko fariĝis ĉefurbo kaj reprenis sian originan nomon.

Estas mirige, ke inter 36 kongresoj, nur tri okazis en la Alta Nordo, Helsinki, Stockholm kaj Malmö kaj kun Oslo la nombro estos kvar (10–11%). Iam ni devos tamen kunveni en

Kopenhago, same simpatia urbo kiel la cititaj.

Kion prezentas Oslo al fremdulo, kiu deziras reveni al sia hejmlando kun impresoj daŭrantaj? Nu, pri natura beleco de la norvega lando ne necesas reklami. Kiu iam vojaĝis tra la fjordoj neniam tion forgesos.

Harald Haardraade (Harald la Severulo), la fondinto de Oslo, estis unu el tiuj vikingoj, la homoj de l'nordo, kiuj konkeris parton de Eŭropo kaj kies postsignojn ni renkontas multloke. Nu en Bygdö,



urboparto de Oslo, en tiu ĉi grandioza natura muzeo oni povas instrui pri la norvega vivo, de la unuaj trovintoj de Ameriko ĝis Kon-Tiki. Ni ĉiuj sekvis kun streĉa atento la kuraĝajn esplorojn de la plej alta nordo kaj antaŭ niaj okuloj vidiĝas la modernaj vikingoj, Nansen, Amundsen kaj Sverdrup. Neforgesebla estas por la verkinto tiu tago en Genève, kiam Fritjof Nansen energie pledis, por ke la mondo helpu malsatantan rusan

popolon, kaj la profunde impresita delegitaro unuvoĉe lin nomis ĉefo de tiu ĉi giganta helpagado, hodiaŭ forgesita.

Akershus, la mezepoka kastelo tronanta ĉe la bordo de la maro, kaj la tute moderna Urbdomo, formas la du polusojn en la evoluo de Oslo. Multon oni povos vidi, sed pri tio... alian fojon.

H.J.

S-ino M. R. Cooke :

La Katedralo ĉe Hereford, Anglujo

NIA kovrilpaĝa bildo bone montras la printempan pacon ĉe la malnova katedralo kaj oni povas facile imagi la brilkolorajn krokusojn reliefigitajn de la griza ŝtono de la katedralaj konstruaĵoj.

Kiom da historio vidis tiu katedralo! Hereford, tra kiu fluas la rivero Wye, estas preskaŭ je la landlimo inter Anglujo kaj Kimrujo. Kvankam nuntempe tio tute ne ĝenas la ĉ. 30.000 enloĝantojn, dum la pasintaj jarcentoj esti apud landlimo ne faciligis la vivkondiĉojn, kaj la historio de la katedralo mem respegulas malpacaĵojn.

En la jaro p.K. 676 estis donitaj al la Episkopo Putta de Rochester (post la detruo de liaj propraj katedralo kaj urbo flanke de la reĝo Ethelred) preĝejo kaj terspaco ĉe Hereford. Tiu unua preĝejo estis tute malimpona—kredeble nur kverkaj traboj kun la interspacoj plenigitaj per vimenaj hurdoj argilkovritaj. Jam en 1012 la Episkopo Athelstan rekonstruigis ĝin kaj al la tiutempa katedralo la Grafino Godiva kaj ties edzo Leofric, la Grafo de Mercia,

donacis terojn, kiuj apartenas al la katedralo eĉ ĝis hodiaŭ.

Estas interese scii kial la memoro de tiu virino estas bone konservata post tiom da jarcentoj. La Grafino havis la reputacion esti tre sankta, bonkora kaj bonfara virino. Ŝajnas, ke ŝia edzo fondis monaĥejon en Coventry kaj nelonge poste devigis al la enloĝantoj de tiu urbo pagi imposton tiel pezan ke post pago ili mortmalsatus. La Grafino Godiva petis kompaton de la edzo, kiu anoncis, ke li permesos nepagon se ŝi surĉevale rajdos tra la stratoj de la urbo tute senveste. La kondiĉo estis anoncita al la urbanoj kaj ĉiuj restis en la domoj kun fenestroj kovritaj dum ŝi plenumis la taskon. Unu sola viro, tamen, kuraĝis elrigardi—kaj li blindiĝis. Tiel la legendo, sed ŝajnas ke estas fakta bazo.

En 1055 la Kimroj brule detruis Hereford kaj la tiutempan katedralon sed baldaŭ poste la Normanaj Episkopoj komencis rekonstruigi ĝin. La nuna konstruaĵo ankoraŭ havas iom da tiu Normana parto, sed de tiu

daŭrigo sur p. 36



Tra la Mondo Esperantista



Britujo

36-a Brita Kongreso okazos je 30 majo–2 junio en Newcastle-upon-Tyne. Inter la multaj programeroj estas la Ĉiujara Kunveno de la Brita E.A., pluraj aliaj kunvenoj, fotografado komuna, balo, kaj diversaj ekskursoj. Ĉiujn komunikaĵojn oni sendu al la Sekretario, 57 West Vallum, South Denton, Newcastle-upon-Tyne 5, Anglujo.

Fervojistoj. La Brita Asocio de Esperantistaj Fervojistoj anoncas sian restariĝon. Sekretario: S-ro C. S. Parry, 80 Sheringham Avenue, London N.14.

Instruistoj. La Jara Konferenco de la Societo de Britaj Esperantistaj Instruistoj okazis je 28–29 decembro 1951 en Londono en la kadro de la Konferenco de Edukaj Asocioj, al kiu S.B.E.I. estas oficiale filiiĝinta. La centra temo de la Konferenco estis *Individua Respondeco kaj la Amasmenso*: kaj la prelegoj de S.B.E.I. ankaŭ rilatis al tiu temo. La ĉefaj parolantoj estis S-ro M. C. Butler, Akademiano kaj Honora Eduka Sekretario de la Brita E.A.; S-ro E. D. Durrant, U.E.A. Komisiito por UNESKO-aferoj, kaj D-ro Ivo Lapenna, U.E.A. Estrarano.

Gvatemalo

Landa Asocio fondiĝis. Post plurjara propagando de D-ro Jules Bonge,

U.E.A. delegito, kaj rapida sed efika kampanjo de S-ro Tibor Sekelj, U.E.A. reprezentanto, kiu nun agadas en Gvatemalo, laŭ iniciato de ambaŭ samideanoj fondiĝis la Asocio Esperantista de Gvatemalo, dum kunveno okazinta je 9 novembro 1951. Prezidanto, D-ro Bonge: Vicprezidanto, D-ro Mario Zecena: Sekretario, Raul Gonzalez: Kasisto Marta Retana. S-ro Sekelj ekgvidis porkomencantan kurson en la Universitato kun 40 gelernantoj.

Hispanujo

Kursoj kaj Festoj. Ni ricevis plurajn raportojn pri kursoj kaj festoj ĉe la grupoj en Barcelona (kun konkursoj), Madrid (okaze de Zamenhof-tago, koncerto kunlabore kun blinduloj apartenantaj al la Nacia Blindulara Organizaĵo), Manresa, Moia, Reus kaj Tarragona.

Radio. Lastmomente venas informo. Vidu la radiopaĝon.

Hongkongo

Kunvenoj. Pluraj samideanoj—Ĉinoj, unu Anglo kaj unu Usonano—renkontiĝis kaj esperas regule kunveni ĉiumonate.

Fervojistoj

4-a IFEF-Kongreso, kiu okazos en Lindau, Germanujo (Lago Konstanca) je 25–30 majo 1952, anoncas provizoran kongresprogramon, kiu

enhavas fakprelegojn, viziton al riparejo, balon, laborkunsidojn, komitatajn kunsidojn kaj ekskursojn.

Limdato por aliĝoj : 15 aprilo 1952.
Adreso : 4-a IFEF-Kongreso, Eisenbahndirektion, Museumstrasse 39, HAMBURG-ALTONA, Germanujo.

Tutmonda Junular-Organizo

8-a Jarkunveno okazos 10-17 Aŭgusto 1952 en Ry, Danlando. Limdato por aliĝoj 1 julio 1952. Adreso de la Organiza Komitato, Brønshøjvej 62 Brh., KOPENHAGO, Danlando.

daŭrigo (de p. 34)

tempo ĝis la nuna jarcento oni ĉiam aldonis al ĝi kaj rekonstruis pecojn, ĝis la hodiaŭa katedralo estas miksaĵo de ĉiuj jarcentoj kaj de ĉiuj stiloj, sed ĉiuj kuniĝas kiel harmonia tuto.

La Ĉenita Biblioteko

Unu el la plej interesaj vidaĵoj en la katedralo hodiaŭ estas la ĉenita libraro. En la mezepoko estis malmultaj libroj—kompreneble, ĉar ne ekzistis la presarto, kaj libroj estis manskribitaj. Libroj estis altvaloraj. Pro tio en la bibliotekoj de la grandaj monaĥejoj kaj katedraloj, kaj en la universitatoj oni per ĉenoj certigis la neforporton de la libroj. Sed en Anglujo nur ĉe la Katedralo en Hereford oni povas vidi tian ĉenitan bibliotekon—kun librujoj, pupitroj, seĝoj, kaj feraĵoj ankoraŭ tie. Entute estas pli ol 1440 ĉenitaj libroj, inkluzive de 217 manskribitaj kaj pluraj el la unuaj presitaj libroj (unu

de Caxton je p.K. 1483; du el Nürnberg kun lignogravuroj de Dürer p.K. 1493; unu presita en Venicio p.K. 1476).

Mappa Mundi

La katedralo havas alian trezoron, kiu estas preskaŭ unika. Tiu estas mapo de la mondo, laŭ la imago en la Mezepoko. (Nur unu alia estas konata, ĉe Nürnberg, Germanujo.) Kanoniko de Hereford desegnis ĝin je p.K. 1305. La mondo estas cirklo kun la arbo Jerusalemo ĉe la centro. Azio estas supre; Eŭropo kaj Afriko sube: Anglujo kaj Kimrujo montriĝas tute maldekstre ĉe la rando. Pom-arbo, sub kies branĉoj estas Adamo kaj Evo, indikas la Ĝardenon Edenan. La Ruĝa Maro estas ruĝa, la Babelturo montras la kieon de Babilono, k.t.p. Nekonataj regionoj havas kiel enloĝantojn unukornulojn, vampirojn, kaj aliajn fabelulojn.

nun pretaj

volumoj de

ESPERANTO, 1951

verdtote binditaj — kun indekso
316 paĝoj kun multaj ilustraĵoj

por MA 1951 de U.E.A. : 5ŝ. 6p. afrankite
por aliaj : 10ŝ. 6p. afrankite

Mendu ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) Anglujo

La Internacia Konkurso

MI opinias, ke neniam evidentiĝis tiom da intereso rilate al la Internacia Konkurso pri membreco kiel en 1951. Ĝis preskaŭ la lasta momento estis amika konkurado inter proksimume dek landoj. Jen la finaj ciferoj:—

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Brazilo ..	2500	5096	203.8
2. Maroko ..	400	665	166.2
3. Portugalujo ..	600	935	155.8
4. Svislando ..	1400	2075	148.2
5. Sud-Afriko ..	250	360	144.0
6. Germanujo ..	2400	3260	135.8
7. Finnlando ..	2000	2690	134.5
8. Italujo ..	1700	2225	130.9
9. Hispanujo ..	1100	1370	124.5
10. Norvegujo ..	1400	1730	123.5
11. Izraelo ..	300	360	120.0
12. Japanujo ..	800	935	116.9
13. Belgujo ..	2100	2415	115.0
14. Britujo ..	12000	12725	106.1
15. Urugvajo ..	250	265	106.0
16. Islando ..	500	510	102.0
17. Svedlando ..	5300	5326	100.5
18. Nov-Zelando ..	800	790	98.7
19. Nederlando ..	5000	4893	97.8
20. Francujo ..	5700	5538	97.1
21. Danlando ..	2800	2690	96.1
22. Aŭstrujo ..	1000	952	95.2
23. Aŭstralio ..	900	830	92.2
24. Kanado ..	250	230	92.0
25. Usono ..	3000	2544	84.8
26. Argentino ..	800	640	80.0
27. Irlando ..	250	195	78.0
28. Kubo ..	250	145	58.0

La venkinto estas Brazilo, kaj ni kore gratulas al la kunlaborantoj tie. La atingoj estas tiel rimarkindaj, ke ni devas citi ilin por ke ĉiu vidu la progreson en ĉiu kategorio. Jen:

	1950	1951
AM. ..	326	711
MJ. ..	45	86
MA. ..	176	277
MS. ..	15	39
Patronoj ..	—	1
DM. ..	—	11
HM. ..	1	1
	563	1126

Pro tiu bonega laboro la Brazilo Esperanto-Ligo ricevos premion £10 kaj ĉiu delegito tie ricevos libro-premion. Gratulon ankaŭ al Maroko, kiu malgraŭ multe pli alta kvoto denove okupas la duan lokon.

El 28 landoj 17 sukcesis atingi sian kvoton kaj ses seponoj atingis pli ol 90%. Vere gratulinda rezulto.

Pro la granda intereso elvokita, nia Estraro konsentis pri simila konkurso por 1952. La aljuĝo de poentoj estos kiel antaŭe—AM. 1, MJ. 5, MA. 10, MS. 15, Patrono 50, nova Dumviva Membro 50. La Landa Asocio en la lando, kiu plej bone sukcesos ricevos £10 kaj ĉiu delegito en tiu lando ricevos libropremion. Jen la kvotoj por 1952:

Argentino ..	700	Izraelo ..	350
Aŭstralio ..	850	Japanujo ..	900
Aŭstrujo ..	1000	Kanado ..	250
Belgujo ..	2300	Kubo ..	250
Brazilo ..	4500	Maroko ..	500
Britujo ..	12000	Nederlando ..	4800
Danlando ..	2700	Norvegujo ..	1700
Finnlando ..	2600	Nov-Zelando ..	800
Francujo ..	5500	Portugalujo ..	800
Germanujo ..	3200	Sud-Afriko ..	300
Hispanujo ..	1300	Svedlando ..	5200
Irlando ..	250	Svislando ..	1400
Islando ..	400	Urugvajo ..	250
Italujo ..	2200	Usono ..	2500

La konkurso en 1952 devus esti eĉ pli interesa, ĉar la plialtigo de la kotizoj starigas tute novan situacion, kaj neniu scias kiel tio efikos. Sed jen tre interesa fakto: la nombro de pagintoj por 1952 je la fino de 1951 estis pli alta ol la kompara nombro antaŭ unu jaro! Neatendita sed kuraĝiga fakto!

C.C.G.



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Box 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtĝirokonto : 153. 85.

GRAVA ANONCO !

Lia Kronprinca Moŝto Olav de Norvegujo afable akceptis esti Alta Protektanto de la 37-a Universala Kongreso de Esperanto.

* * *

Kotizoj : La dua kategorio de kotizoj nun validas ĝis fino de marto.

Dua Bulteno aperos, kun informoj pri loĝejoj kaj ekskursoj, en la fino de januaro.

Traveturvizoj : L.K.K. sin turnis al la norvega pasportkontoro pri senpagaj aŭ rabatitaj vizoj por la landoj tra kiuj iuj kongresanoj devos veturi al Oslo. La instanco informas, ke la kongresanoj mem (pere de sia landa asocio) devos sin turni al la koncernaj landaj instancoj por peti favoron.

Bankĝiro : Kiam oni pagas en eksterlando per ĝiro la norvega banko deprenas 1.80 kr. Prefere aldonu iom pli ol la ĝustan sumon por kompenso. Kromaĵon oni redonos en la kasĉeto de la kongreso.

Pago per ĉeko : Pro ĉekoj el eksterlando la banko deprenas 50 oerojn. Prefere pluraj anoj pagu per unu ĉeko se eble.

Pagoj ĝenerale : En la jenaj landoj funkcias perantoj: Belgujo, R.B.L.E.; Britujo, U.E.A.; Danlando, L. Jakobsen; Finnlando, J. Vilkki;

Francujo, U.E.F.; Germanujo, G.E.A. Nederlando, P. Moen.

Nemembroj de U.E.A. : Jam evidentiĝas, ke pluraj kongresanoj ne atentis la regulon pri ekstra kotizo. L.K.K. regule kontroligas la listojn ĉe U.E.A. Nepago de la ekstraj 5 kr. kaŭzas multe da laboro.

Statistiko : Ĝis la fino de la jaro aliĝis 406 kongresanoj el 21 landoj, jene: Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 7, Belgujo 5, Brazilo 1, Britujo 95, Danlando 19, Finnlando 1, Francujo 13, Germanujo 25, Hispanujo 2, Italujo 23, Izraelo 2, Jugoslavujo 4, Nederlando 14, Norvegujo 111, Pollando 2, Portugalujo 1, Svedujo 65, Svislando 9, Usono 5.

Mason Stuttard, K.K.S.


LA UNUA SEKCIO

La temo por diskutado en Oslo estos *Esperanto en la Edukado de la Grupoj*.

Estus treege utile por la prepar-laboro se grupsekretarioj povus sendi al la prezidanto de la Sekcio unu ekzempleron de sia nunjara programo por la grupkunvenoj. Se ĉi tiu titolo sur la programo ne estas memklara, mallonga klarigo akompananta multe helpus.

Tiajn programojn oni bonvolu sendi kiel eble plej baldaŭ, al la prezidanto de la Unua Sekcio, D. Kennedy, 21 Westfield Road, BISHOP AUCKLAND (Co. Durham), Anglujo. Koran antaŭdankon al ĉiuj, kiuj kompreneblas.

D.K.



Sankta fontano de Rumengol

Ch. Le Seac'h :

Bretonaj pardonoj

*“Bretonujo, tero granita,
Kaj je kverkoj tute kovrita . . .”*

jam de longe diris unu el niaj plej ŝatataj poetoj.

“Bretonujo, tero de la prasanktuloj kaj de la bardoj” kantas la bretona himno *Brogoz ma zadou* (=la malnova lando de miaj patroj) kiu estas kvazaŭ nacia kantaĵo.

Ĉu vere ĝi estas ankaŭ la patrujo de la sanktuloj ?
Sendube !

Promenu tra niaj kamparoj, tra niaj erikejoj kaj uleksejoj, sekvante kompreneble vojojn fantaziajn, sanktejojn etajn kaj grandajn. Almenaŭ unu fojon ĉiujare, iafoje eĉ pli ofte, la ĉirkaŭa loĝantaro, el la

kiuj “neniam iras rekten”. Subite ĉe vojkurbiĝo, flanke aŭ meze de pitoreska arbareto, kun la okuloj pro surprizo ĉarmitaj, vi ekstaras antaŭ unu el tiuj pentrindaj kapeloj tiel multenombraj en nia regiono. Ĝi kredeble estas verde vestita de silkeca musko kaj ankaŭ plibeligita de duongriza likeno desegnanta sur la skulptita granito la plej neatenditajn brodaĵojn.

Tiu arkitektura ĉefverketo ne estas unika specimeno. Tute ne ! Centoj da aliaj diskrete kaŝas sin ĉiuloke sur niaj kamparoj, sen kalkulo pri la vastaj kaj imponaj paroĥaj preĝejoj. En mia naskiĝa kanton Brieĉ ili estas ĉirkaŭ dek kvin, ĉiu ĉiam pli bela ol la alia.

Ĉiu portas la nomon de iu patrono aŭ patronino, bretonaj gesanktuloj : Venek, Kado, Vio, Egarek, Tuĵen, Tudal, Ronan k.t.p.

Ho, ne serĉu ilin sur la kalendaro rek en iu ajn oficiala listo eklezia de la sanktigataj.

Ne, ili estas niaj propraj sanktuloj, niaj propraj patronoj . . . Niaj prapatroj jam de pluraj jarcentoj al ili dediĉis veran kulton, ĉu permesitan aŭ ne, kaj konstruis por ili tiujn



ĉe Pardonno S-ta Anne la Palud

vilaĝoj kiu konsistigas la *trevo** de la kapelo, tie kunvenas.

El la paroĥo venas pastro por soleni la feston dediĉatan al la koncerna patrono. Tio estas la "Pardono".

Eĉ la infanetoj laŭeble iras tien, ĉiuj kun kiel eble plej belaj vestoj. Ili ankaŭ aĉetas ludiletojn kaj frandaĵojn. Inter la meso kaj la vespera diservo oni ludas. Kelkaj kafejetoj por la tuta tago starigas tendojn kie oni povas iom trinki, eĉ... drinki! kaj... ts... ps... oni rakontas ke niaj tre malproksimaj praavoj estis iom batalemaj. Sed ne ripetu, ĉar tio eble estas nur klaĉo! La malbonaj langoj eĉ asertas, ke ĉe mia naskiĝa *trevo* Gresker post la pardono oni ne demandis "Ĉu okazis

bataloj" sed "Kiu batalis hodiaŭ?", kaj ke la perdintoj gajnis la froston kaj la prujnon por siaj ĝardenoj kaj kampoj...!

Tiuj kvazaŭ amikaj bataletoj neniam lasis nek en la spirito nek en la koro la plej malgravan postsignon. Estis nur duondeviga, tradicia ludeto.

Hejme, en ĉiuj familioj de la *trevo* okazas ankaŭ la "pardonfesteno" al kiu oni invitas malproksimajn parencojn. Oni kutime manĝas tritikajn krespojn, bretonajn kukojn kaj multajn aliajn bonaĵojn, kun la tuto kompreneble surverŝita de tiu bongusta orkolora suko de niaj pomoj, nia cidro, kiu por la Bretonoj, almenaŭ dum tiu tago, ankaŭ estas sankta, se ne dia. Fine oni aldonas al ĝi glason da pombrando. La manĝado daŭras longe kaj finiĝas gaje. Oni babilas, oni kantas, oni estas feliĉa!

Do ne kredu post tio, ke la bretona popolo — kiel ofte volas kredigi mensogema literaturo — estas melankolia, sopiretema, malgaja! Kiu diras tion, neniam vidis niajn festojn nek niajn pardonojn. Iru por vidi ĉe Pont-l'Abbé dum la *Treminou**! Se vere niaj samlandanoj kiam estas bezone scias preĝi, ili ankaŭ ne malscias esti ridemaj kaj vere gajaj.

Tiuj multaj pardonoj okazas kutime ĉe la lokoj mem kie la prakeltoj kaj la gaeloj antaŭ jarmiloj kredeble solenis la druidajn ceremoniojn, ofte apud la fontoj. Tio estas facile komprenebla. Ĉu la akvo kiu fluas aŭ ŝprucas el ili ne estas kvazaŭ la sango de la tero, sango pliriĉigita, dum ĝia subgrunda kaj longa irado, per multaj solvaĵoj necesaj por nia sano?

* *Treminou* = kapelo apud Pont-l'Abbé: ambaŭ lokoj kuniĝas por celebri la 'pardonon'.

* *trevo* = neoficiala subdivido de paroĥo



ĉe Pardono S-ta Anne la Palud

*ĉe Pardono Folgoet :
virinoj de
Plouguerneau*



La sanktuloj, venintaj plejparte el la brita insularo, predike paroladis je la nomo de Kristo, dissemante la novan doktrinon kaj anstataŭante la antaŭajn druidojn, kiuj cetere plejmulte fariĝis kristanoj. Ĉu nun ne estas kompreneble, kial apud ĉiu kapelo troviĝas ankaŭ fonto, ofte kovrita per beleta monumento, kien oni venas por trinki iom da sankta akvo, kiu—kial ne?—donas sanon, plibonigon aŭ esperon, ĉar la sanktulo estas samtempe iom kuracisto aŭ resaniganto. Kelkaj el ili eĉ estas protektantoj de la brutaro.

La Bretonoj preĝvokante siajn patronojn, diras: "Sanktuloj de nia lando, se nin vi ne volas aŭskulti, kiu do, ve, ja povos nin aŭdi?" Iliaj nomoj nun ankoraŭ troviĝas en la nomoj de multaj lokoj, precipe tiuj komenciĝantaj per Plo, Plou, Plu, Lok, Gui, Land, k.t.p.

Rimarku, ke ĝis nun ni traktis la pardonojn malplej konatajn, kiuj tamen estas la plej multaj. Sed ekzistas aliaj, la grandegaj, la gigantaj! Al ili oni pensas, kiam oni mencias la Bretonajn Pardonojn: S-ta Anne de 'Auray, S-ta Anne de Palud, Lokronan, Rumengol, Folgoet

k.a. Milope kaj dekmilope la fideluloj pilgrimas al tiuj sanktaj lokoj.

La Palud! Certe neniu loko povus esti pli taŭge elektita! Ĝi kuŝas ĉe la bordo de unu el la plej belaj marpejzaĝoj troveblaj sur la terglobo, la golfo de Douarnenez, komparebla kun tiu de Napolo. Suprengrimpu la dunojn kiuj ŝirmas la kapelon. Kvazaŭ sub la piedoj oni povas admiri tiun vastan duoncirkulon da moviĝanta ondaro. Surkarte ĝi havas virinan profilon. La legendo certigas, ho ve! ke ĝi estas tombego. Sub ĝi dormas por ĉiam nia belega ĉefurbo Iz, dronigita pro la kulpo de Dahut, la malvirta filino de nia maljuna reĝo Gradlon la Granda. Tiu urbo estis tiel granda kaj bela, ke nur Parizo estas al ĝi simila.

Ankoraŭ nun oni povas iafoje aŭdi tra la ŝtormaj bruegoj tinti la sonorilojn de Iz kaj eĉ la malesperajn kriojn de la malfeliĉa princino, kiun la patro mem ĵetis en la maron ĉe la loko de tiam nomita Gouldahut. Verŝu se vi volas larmon memoran al Iz, Gradlon kaj Dahut, sed grandokule rigardu nun la spektaklon kiu elvolviĝas antaŭ vi...

Ritmo de sonorilaro kaj religiaj kantoj plenvoĉe kantataj. Flagoj kaj krucoj alte starigitaj kaj aliaj ornamaĵoj portataj de vivofortaj gejunuloj vestitaj per tiuj belaj kolororiĉaj kaj brilaj kostumoj de Kernevo. La vortaro estas tro malriĉa doni nur etan ideon pri la sceno tiel belega.

Karaj legantoj, kredu aŭ ne kredu pri la bretonaj pardonoj, se vi tamen vidos ilin vi certe admiros ilin kaj pensos al la sanktuloj kiuj inspiras tiujn grandiozajn festojn.

(Pro la fotoj ni sincere dankas al Paroĥestro Thomas de Plonévez-Porzay, al Kanoniko Abgrall kaj al Kanoniko Guéguen, paroĥestro de Folgoet—kaj al S-ro le Seac'h pro la havigo.)

Julio Baghy :

Sub Lunlumo

*Sun' de mortintoj, luno palvizaĝa,
psalmas al ci la nokta ĥor' vilaĝa :
la kolere plenda hunda boj' . . .*

*Ci, satelit' kun sunpruntita lumo,
sed jam mortinta sur Ĉiel-forumo,
homan vivon bildas cia voj' . . .*

*Lune ni venas, kreskas, konsumiĝas,
inter mil ŝajnoj treme superstiĉas,
vivon ludas ni sur Mortovoj'*

*kaj ni reflektas lumon de jarmiloj,
trompe paradas nur—en fremdaj briloj;
sekvias nin—kolera hunda boj' . . .*

daŭrigo (de p. 43)

Nevalidaj por la konkurso estas verkoj aperintaj en presa formo. Laŭeble la premiitaj verkoj aperos en la revuo *Esperanto*, kiu havas la rajton pri unua publikigo.

La premiitaj verkoj estos deklamataj, respektive ludataj, dum speciala kunsido en la kongreso.

Premioj. Estas tri premioj en ĉiu branĉo. Ĉiu sukcesinto ricevos diplomon oficiale subskribitan kaj ankaŭ elektos librojn laŭ la valoro de la gajnita premio.

Ĉiuj artamantoj havas eblecon donaci apartajn premiojn por apartaj branĉoj. Tiuj premioj ricevas la nomon laŭ la persono, kiu donacas la premiojn.

Eventuale la Estraro de U.E.A. plivastigos kaj plivariigos la belartan kadron per ankoraŭ novaj branĉoj :— ekzemple kantoj solaj kaj ĥoraj, dancoj, desegnaĵoj, afiŝdesegnoj, fotografio, hejmaj artlaboroj, specialaj ekspozicioj k.t.p. Kiu deziras doni iniciaton pri io tia, bonvolu prezenti proponon !

Estas eblaj ankaŭ specialaj konkursbranĉoj sub patroneco de apartaj artamantoj. Oni direktu sian proponon unuavice al la sekretario de la Belarta Konkurso.

**Limdato por ricevo de Konkursaĵoj :
La 31-a de Majo, 1952.** Sendu ĉion al la sekretario :

Reto Rossetti, 39 Willows Crescent,
Birmingham 12, Anglujo.

Reto Rossetti :

La Belarta Konkurso de U.E.A., 1952

*Verkistoj kaj artamantoj—fokusu la talentojn al Oslo
por triumfa manifestacio de la Esperanta kulturo !*

JE la tria jaro de la Belarta Konkurso ni invitas niajn diversfakajn verkistojn kaj artistojn kunlabori por impona kultura rezulto ĉe nia 37-a U.K. en Oslo. En la Belarta Konkurso rajtas partopreni ĉiu kongres-aliginto kaj ankaŭ ĉiu individua membro de U.E.A., egale ĉu tiu iros aŭ ne al la kongreso. Ni do mobilizu niajn talentojn por brile superi la nivelon de ĝisnunaj kongresoj kaj demonstri en la norda ĉefurbo la riĉecon kaj kulturvaloron de nia lingvo !

Kun via helpo kaj entuziasmo la konkurso povos pligrandigi sian skalon kaj fariĝi ĉefa ĉiujara fokuso por la esperantistaj belartaj talentoj. Verva konkurado per verkoj kaj spektakloj edifos la kongresanojn kaj imponos la eksterulojn. Kaj tia-maniere la Belarta Konkurso, kune kun la Somera Universitato kaj la Oratora Konkurso, manifestos al ne-esperantistaj kleruloj, **kiel ankaŭ al la esperantistoj mem**, la vivan rolon de nia lingvo en la kulturaj sferoj.

Ĉio bone aŭguras, por ke la Osla kongreso marku novan kulturan alton inter la kongresoj postmilitaj. Ni agordu la talentojn kaj koncentru la fortojn por tion garantii !

La Belarta Konkurso ĉi jare havas 6 branĉojn signitajn per la literoj A B C D E F jene :—

A. Poezio originala

B. Poezio traduka

Ĉiu poemo po maksimume 36 versoj. Oni rajtas partopreni per maksimume 3 poemoj en ĉiu branĉo. Eventuale ni konsideros pli longajn

poemojn kondiĉe, ke oni ne superu 108 versojn en la tuta koncerna branĉo (oni do sendas 1 aŭ 2 poemojn anstataŭ 3).

C. Prozo originala

D. Prozo traduka

De kia ajn speco (serioza, bonhumora k.t.p.). Ĉiu prozaĵo maksimume po 200 maŝinskribitaj linioj de proksimume 65 spacoj. Oni rajtas partopreni per maksimume 3 verkoj en ĉiu branĉo.

E. Teatraĵeto originala

F. Teatraĵeto traduka

Ludodaŭro maksimume 25 minutoj. Oni rajtas partopreni per maksimume 3 verkoj en ĉiu branĉo.

Sendu la konkursverkojn en 5 ekzempleroj (la juĝa komisiono konsistas el kvin membroj el kvin diversaj landoj). Ĉe tradukoj liveru ankaŭ 5 ekzemplerojn de la originalo. La konkursanto zorgu eventuale pri kopirajto de tradukita teksto.

Aldonu 3 respondkuponojn—egale ĉu vi partoprenos en unu aŭ pluraj branĉoj. Se tamen la leĝo de via lando permesas sendi nur du, unu aŭ eĉ nenium respondkuponon, faru konforme, ĉar en tiaj kazoj ni adaptas la regulon al la realo. **Ĉefe estas, ke vi partoprenu.**

Vi devas signi ĉiun verkon per pseŭdonimo kaj aldoni en fermita koverto slipon kun la pseŭdonimo kaj la vera nomo kaj adreso, eventuale kun la kongresnumero. Sur la koverto skribu nur la pseŭdonimon kaj la branĉon partoprenatan.

daŭrigo sur p. 42



Vivo Virina

Gvidantino de ĉi tiu rubriko estas : S-ino R. M. Dhonau, Avondale, Cromer Road, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo, al kiu oni adresu ĉiujn korespondaĵojn pri *Vivo Virina*.

Kiu volas respondon, nepre sendu rpk. (Britoj pm.) por afranko.

Dormo por Infanoj.

Dormo estas la plej bona refreŝigilo por la nerva sistemo de infano. Dum la unuaj monatoj de la vivo la cerbo kaj la nerva sistemo kreskas tre rapide, do longaj, neinterrompitaj periodoj de dormo estas nepre necesaj. El la 24 horoj tre juna bebo bezonas dormi 21 horojn ; je 2 aŭ 3 monatoj 20 horojn ; je 7-12 monatoj 17 horojn.

Oni povas eduki infanon al dormo ĝis dormo iĝas kutimo. De la naskiĝo oni devas kuŝigi la bebon post la manĝo. Se li estas daŭre malriposa, konsultu la kuraciston, sed ĉi tie sekvas kelkaj kaŭzoj de sendormeco en infanoj.

Maltaŭga dieto (se nutrita per botelo).

Soifo (infano bezonas multe da boligita, malvarma akvo).

Tro da litkovriloj.

Subita bruoj.

Tro da ekscito tuj antaŭ la enlitiĝo. (Ni ŝatas aŭdi la ridon de infano, sed antaŭ la dormo tro da ludo estas

malbona, ĉar la nerva sistemo de infaneto estas tre delikata).

Se bonaj kutimoj stariĝas dum la fruaj tagoj kaj monatoj de la vivo, la patrino faras ion tre gravan por la venonta vivo de sia infano.

Virinoj en Tibeto.

Kiel stranga estas la vivo de virinoj en Tibeto ! Estas tie permesite, ke virinoj havu pli ol unu edzon. Ofte virino havas 5 aŭ 6—kutime ili estas fratoj. Ĉiuj infanoj apartenas al la plej aĝa frato.

Virinoj portas tre belajn vestojn de multaj brilaj koloroj, sed ili neniam lavas sin. La ventoj estas tre fortaj kaj la lavado estus malagrabla. Laŭ ilia opinio la plej sanktaj estas la plej malpuraj. Virinoj havas egalajn rajtojn kun la viroj—ili devas eĉ iĝi monaĥoj (ne monaĥinoj) kaj oni multe respektas ilin.

Kion ili trinkas ? Teon, kiel anglaj virinoj ? Kafon, kiel en Eŭropo ? Teon, *ne* kun lakto, sed kun multe da ranca butero.

Recepto de la monato : (el Jugoslavujo). *Brasika Salato*

Brasiko, iom da blanka vinagro, oleo, sukero, salo, pipro, cepo, ajlo, mustardo.

Tranĉu brasikon en malgrandajn pecojn, kaj boligu ĝin kelkajn momentojn en sala akvo. Lasu ĝis malvarmiĝo. En aparta pelvo miksu blankan vinagron kaj oleon, iom da sukero, salon, pipron, malgrande hakitan cepon, iom da raspita ajlo kaj mustardo. Verŝu la miksaĵon sur la brasikon, skuu kaj lasu dum duonhoron.

Theodor F. Meysels :

Popolo en la flugmaŝino

“ENTREPRENO sorĉtapiŝo” (*Operation Magic Carpet*), la unua transloĝigo de tuta popolo per flugmaŝino, pri kiu la historio scias, estas antaŭ sia finiĝo. Dum unu jaro estas transportita en Izraelon per 350 ir-revenflugoj la judoj de Sud-Arabujo, Jemeno kaj Hadramaŭt—preskaŭ kvindek mil personoj. Flugante trans Arabujon de Saud, kiu neniam estus permesinta la trapason de la judoj, por kiuj Egiptujo fermis ankaŭ la kanalon de Suez, la imponaj *Skymaster*-aviadiloj de *Joint Distribution Committee* (Kuniĝinta Distribua Komitato) revenigis en la antikvan hejmlandon frue perforte disigitan eron de la juda popolo. La entrepreno estas senekzempla. Eĉ ne dum la dua mondmilito estis farata fluga transporto de simile granda homamaso. Neniam antaŭe popolo, kies kondiĉoj de vivado estis restintaj tute mezepoke feŭdaj, estis tiel metita dum malmultaj horoj en la medion de agrikultura ŝtato eble la plej moderna en la mondo.

La judoj de Jemeno estas pursangaj posteuloj de elmigrintoj, kiuj forlasis Palestinon tre baldaŭ post la Romana detruo de Jerusalemo (70 p.K.). Ilia artmetio, la vestoj de iliaj virinoj, restis helenecaj. Ilia vivmaniero apenaŭ ŝanĝiĝis post la tempo de la krucmilitoj. Ili formis malaltan kaston en la rigida organizaĵo de la regno de imamoj, kies tabuoj jam de longe estis al ili memkompreneblaj. La bibliaj profetaĵoj neniam perdis sian potencon super tiu ĉi popolo. Dum du jarmiloj ili atendis la profetitan revokon en la landon de la

prapatroj. Kiam la informo pri la ŝtatigo de Izraelo ilin atingis, la torditaj kornoj de virŝafoj en la getoj de la monturboj de suda Arabujo vokis al ekmigro. La migrado de la Jemenaj judoj estis mesia movado en nia sendia epoko.

En la kolekto de la “*Joint*” en Aden la urbanaj judoj el Yemen, la arĝentistoj, brodistoj, kelkaj terkulturistoj, renkontis la beduenjudojn el la Hadramaŭt-posteuloj de la gentoj, kiuj en la unuaj jarcentoj de la kristanerao fariĝis judoj kaj en la tempo de Mahometo nombriĝis laŭ centmiloj. Tie ĉi tiuj homoj el la tre antikva tempo atendis semajnojn, ĝis estis ilia vico eniri la flugmaŝinon. Sen ekscitiĝo, ĉar la biblio asertas, ke iam ili hejmeniros “*sur la flugiloj de agloj*”.

La tendarejo de Aden, malnova kampo de la Usona flugarmeo, en kiu Jemenanoj poste kolektiĝis, situas sur la dezertismo, kiu la duoninsulon de Aden ligas kun la araba kontinento. Ĉi tie la migrantoj estis nutrataj por la transloĝigo en Izraelon. Ili estis piede marŝintaj kelkajn semajnojn. Tio estis migrado, kiu faskigis ĉiajn penegojn de la biblia “*exodus*”, antaŭ ol la ŝarĝaŭtoj de “*Joint*” ilin transportis en la tendaron. Estas interesa detalo de la historio de la Oriento Meza, ke tiuj ĉi karavanoj, kiuj ofte kunportas atentindajn valoraĵojn, neniam estis ĝenataj dum sia krozado tra la lastaj blankaj pecoj de la karto de nia mondo, ĉar ili akurate pagadis la doganon al la multaj etsultanoj, kies landetojn ili trapasas.


Ili estas gajaj homoj kun la bonkoreco de infanoj, naivaj, por kiuj la tendaro estas regno de neimagitaj mirakloj.

La familioj el Hadramaŭt kaj Jemen en la tendaro estis grupigataj kaj kutimataj al la ĉiompotenco de la skribita papero. Iom post iom la unuaj legitimiloj, la unuaj porciumiloj en ilia vivo estis komprenataj laŭ ilia decida graveco. Laŭ la vico de ilia alveno la elmigrantoj estis vokataj por la pluirado al Izraelo. Ili pakis la bildojn de siaj ĉielaj protektantoj, la praaĵn rulaĵojn de Thora kaj la preskaŭ same malnovajn viraltajn nargileojn. Oni kondukis ilin al la

flughaveno. Ili eksidis sub la grandegajflugiloj de la maŝinoj kaj atendis ĝis la virŝafa korno de la rabeno ilin vokis por la alvojaĝo.

Nun la montaraj judoj de Jemen jam nur gutadas per grupetoj de postĝintoj en la Aden-tendaro. Sed la *Skymaster*-oj de "Joint" ne mallaboras. Ili estas disponitaj al nova entrepreno, kiu ĵus komenciĝis. Nun la judoj de Irako flugas en Izraelon. La idoj de ankoraŭ pli malnova elmigrado, de tiuj judoj babilonaj, kiujn Nabukonodosoro (604–562 a.K.) forportigis, decidis reveni hejmen.

(El *Die Österreichische Fürche* trad. D-ro A. Halbedl, kun permeso de la aŭtoro.)



Oficialaj Informoj de la Akademio de Esperanto

(N-ro 18—Novembro 1951)

ESTRARO DE LA AKADEMIO

Post la okazintaj elektoj de la Direktoroj de la Sekcioj de la Akademio de Esperanto, la Estraro nun konsistas el la sekvantaj personoj:

Prezidanto : Ir. J. R. G. ISBRUCKER, Oostduinlaan 32, Den Haag, Nederlando.

Vicprezidantoj: A. CSEH, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando, kaj Prof. D-ro E. PRIVAT, Evole 3, Neuchâtel, Svisujo.

Direktoro de la Sekcio por la Gramatiko : D-ro W. LIPPMANN, 1021 East 14th Street, Brooklyn 30 (N.Y.), Usono.

Direktoro de la Sekcio por la Literaturo : G. AVRIL, 60 Boulevard Auguste Raynaud, Nice (A.M.), Francujo.

Direktoro de la Sekcio por la Ĝenerala Vortaro : Prof. G. WARINGHIEN, 7 Avenue Léon Gourdauld, Choisy-le-Roy (Seine), Francujo.

Direktoro de la Sekcio por la Teknikaj Vortaroj : J. OKAMOTO, 2435 Sinobi-cho, Ueno, Mieken, Japanujo.

Direktoro de la Sekcio por la Bibliografio : D-ro P. NEERGAARD, Gothersgade 158, Kopenhavn-K, Danujo.

La taskojn de la Ĝenerala Sekretario-Kasisto provizore plenumas la Prezidanto kun helpo de la Internacia Esperanto-Instituto.

Ir. J. R. G. ISBRUCKER
Prezidanto.



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimitajn opiniojn.

Survoje al Aŭstralio

Dum ŝipvojaĝo mi renkontis 3 samideanojn, kiuj veturis Nov-Zelandon: du el ili Hungaroj, la tria Litovo. Ili trioje kantis Esperante dum S. Meso celebrata de mi dum marvojaĝo.

Hodiaŭ vespere mi estis invitita al klub-konveno. Mi estas tre kontenta, ĉar ĉie oni sentas la bonan kaj amikan 'Verdan Koron'. Espereble mi ĉeestos Sydney'an Kongreson de Esperanto.

Fr. Sigismond, Aŭstralio.

Petoj al eks-Delegitoj de U.E.A.

.... Mi tute konsentas kun vi kaj bone komprenas, ke nenio estas farebla, se delegito ekŝiĝis. Tamen: jen malbona situacio. Oni skribas leteron al Delegito listita en la Jarlibro, kunsendas unu, du, eĉ tri respondkuponojn, ne ricevas respondon, ree skribas, eble registritan leteron kun pli da rpk., kaj ree neniu rezulto! Mi pensas, ke simpla deco devus igi tian ek-eksdelegiton respondi, ke ne estante plu Delegito, li bedaŭras ne povi plenumi la servopeton. Certe oni ne povas devigi iun al tio, sed mi proponas, ke niaj Delegitoj estu oficiale petataj, fari tion almenaŭ en la unua jaro post sia ekŝiĝo.

W. Lippmann, Usono.

Informpetoj

Baldaŭ mi organizos Esperantan ekspozicion kaj mi volas fari kelkajn statistikojn, sed kompreneble la precizaj informoj mankas al mi. Mi petas vin sciigi al mi la ĉi-subajn informojn:

1. *La Petskribo al UNO.* Mi bezonas la detalajn ciferojn kaj indikojn pri la okupoj.


2. *La Universalaj Kongresoj.* Kie ili okazis kaj kiom ĉeestis?

3. *Pri la stato de la membraro de U.E.A.* En 1949 estis 18.749: en 1950 14.711; kiel mi povas klarigi ĉi tiun malprogresadon?

Plej sincere via, X.X.

★ Ni publikigas ĉi tiun leteron (kompreneble sen la nomo de la demandinto) por havi okazon montri al nia legantaro kiom da informo ili jam havas, sed plej ofte ne scias ke ili havas. (1) *Petskribo.* Plena informo estas sur p. 48 de la Jarlibro 1950, 1-a parto. (2) *U.K.* p. 48, Jarlibro 1951, 1-a parto. (3) *Membraro.* (ne tiel facile) Komparu paĝojn 38 (Jarlibro 1950, 1-a parto) kaj 12 (Jarlibro 1951, 2-a parto). El tiu komparado oni povas vidi ke preskaŭ malaperis kaj Ĉeĥoslovakujo kaj Pollando el la membraro pro la nunaj cirkonstancoj, (perdo ĉ. 5.000); sekve en aliaj landoj, la membraro eĉ kreskis.

Certe, faru demandojn al ni; ni volas helpi. Tamen ne forgesu ke en la 300 paĝoj de la Jarlibro estas enpakitaj miloj da informoj: ĝi ne estas nura listo de delegitoj.



Tra la Libraro

Duope ricevitaĵn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevas nur mencion.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*Recenzoj enhavas la proprajn opiniojn de la recenzintoj.
Ili ne necese estas laŭ la oficiala starpunkto de U.E.A.*

***Aktualaj Problemoj de la Nuntempa Internacia Vivo** de D-ro Ivo Lapenna. Eld. la aŭtoro. 20 × 15cm. 144 p., prezo kart. 10ŝ., afranko 6p.

La ĉefan valoron donas al mondlingvo ĝia enhavo. Ju pli da gazetoj kaj verkoj pri internaciaj aferoj eldoniĝos en Esperanto, des pli vaste ĝi plenumos sian rolon kaj sian celon, kiu ĉiam estis helpi al unuiĝo de la homaro respektante la nacian diversecon. Laŭ tiu sama spirito Prof. Lapenna verkis sian novan gravan libron pri nuntempa internacia vivo.

Antaŭ ĉio li donas utilan dokumentaron, informon kaj instruon pri la tuta oficiala klopodo por ekorganizi la societan vivon inter ŝtatoj. En unua parto li klarigas fundamentojn ideojn pri nacio, ŝtato, internacia juro, diplomatio kaj federacioj. En dua parto li montras kiel oni jam eksolvis konfliktojn per arbitracio aŭ per juĝo. Li priskribas la organizon de la Haga Kortumo, diskutas la procesojn pri militkrimoj kaj analizas la Deklaracion pri Homaj Rajtoj.

En tria parto li donas la historion de Unuiĝinta Naciaro, kaj ekzamenas ties funkciadon. Poste li konigas la ceterajn pli specialajn instituciojn kaj fine konkludas per resumo.

Tia volumo estos tre valora ilo en la manoj de instruistoj, kiuj deziras interesi la lernantojn je mondproblemoj. Edukado de la junularo

sur tiu kampo same necesas nun kiel la edukado al civitaneco en la propra lando. Ankaŭ utilos la libro al ĉiuj ne-fakaj legantoj, kiuj emas mem al mond-civitaneco kaj ne volas resti homaranoj nur malprecize kaj sonĝe. Kvankam li estas profesoro kaj fakulo, D-ro Lapenna verkis popularan libron, facile legeblan en bela kaj agrabla stilo.

Ni danku lin pro tiu talenta riĉigo al nia esperanta biblioteko. En sia antaŭparolo Prof. Lapenna prave plendas ke ĝis nun la esperanta publiko ne sufiĉe kuraĝigis eldonon de seriozaj originalaj verkoj kaj tiamaniere perdis multajn okazojn por plivalorigo de nia lingvo. Espereble la nova generacio agos pli lerte kaj pli komprene.

* * *

En la teoria parto de la verko la influo de Karl Marks estas klare sentebla pri evoluo de la ŝtato. La aŭtoro forĵetas ne nur la teologian klarigon—kio estas ja komprenebla—sed eĉ la “kontraktan”. Tamen ekzistas en la historio faktoj favoraj al tiu ĉi dua. La anglaj migrantoj al Nordameriko, speciale la famaj Puritanoj de la “Mayflower” en 1620 certe fondis ŝtaton sur bazo de kontrakto, sed estas vere, ke ilia kondiĉo estis aparta kaj estas ankaŭ vere, ke ilia kolonio baldaŭ fariĝis klasa kaj pro tio la novaj alvenintoj fondis Connecticut kaj Rhode-Island.

Sur paĝo 22 la mencio pri Svislando dum la periodo 1798–1814 necesigus diferencigon inter la provo de unuecigo “Helvetika” kaj la reveno al konfederacio sub Napoleono.

Sur la paĝo 29 tre utila estas la komparo inter la du vidpunktoj rilate al militkrimoj: la mondjura kaj la nacijsura. En mia esperanta verko *Interpopola Konduto* mi siatempe insistis pri la necesa gimnastiko pensa por rigardi la faktojn per diversaj okulvitroj: el-interne kaj el-ekstere.

Mi ne riproĉas al Prof. Lapenna, ke li ne donis pli da loko al la problemoj pri mondfederalismo, ĉar mi decidis verki mem esperantan libron pri tio, sed mi ne konsentas kun li pri la pli-realeco de la klopodoj “eŭropaj”. Male mi konstatas ke Eŭropon tranĉas ferkurteno kaj ke Strasburg ne fruktodonas, ĉar tio, kion oni nomas “Okcidento” entenas ankaŭ Amerikon kaj la Britajn ŝtatojn en Oceanio. Anglujo sentas sin pli “monda” kaj “mara” ol “eŭropa”. La malfacileco kunligi ŝtatojn kumunistajn kaj kapitalistajn ekzistas samgrade sur la eŭropa kaj sur la monda kampoj. Ankaŭ gravas la psikologia elemento: eŭropa sento tute mankas, sed homara sento iom ekzistas.

* * *

Pri la lingvo de la verko, mi rimarkis utilajn diferencigojn, kiel “fare de” kaj “ek de”, ankaŭ “Asambleo” anstataŭ “Kunveno”, nesufiĉe preciza. Prof. Lapenna ŝatas skribi “kaj bona kaj prava” tie, kie multaj el ni skribus “ambaŭ bona kaj prava”, eble sub angla influo de “both”. Ĉu li pravus kaj ni eraras? Ĉu la du formoj estas klaraj? Jen demando. Same pri aŭ . . . aŭ kaj ĉu . . . ĉu.

Nur unufoje mi legis en la libro la vorton “Regno”, uzitan por traduki la germanan “Reich”. En ĉiuj aliaj okazoj la vorto “ŝtato” estis preferata. Ĉu ne taŭgus rezervi la vorton “ŝtato” por la interna organizo kaj uzi “regno”, kiel Zamenhof, por sendependa lando kun limoj kaj propra diplomataro? Mi hezitas mem.

Por parlamentoj mi preferas “Ĉambrojn” al “Domoj” laŭ ĝisnuna uzo. Prof. Lapenna skribas “konsilon” anstataŭ “konsilantaro”. Se la vorto nepre necesas, tiam estus eble pli saĝe provi “koncilon” por eviti dusencaĵon. Anstataŭ “Unuiĝintaj Nacioj” mi preferas “Unuiĝintan Naciaron”. Prof. Lapenna prave deziras diferencigi centran federacian organizaĵon kaj regnojn aŭ ŝtatojn kiuj partoprenas la federacion. Li nomas ilin “federalaj unuoj”, sed mi timas, ke tio kaŭzas miskomprenon, ĉar la popoluzado jam donis al “federala” la saman sencon kiel al “federacia” kaj estas pli bone skribi “apartaj” tie, kie la usona konstitucio diras “several”.

Pri “mediacio” kaj “arbitracio” neniu rajtas nei, ke ili necesas en la jura vortaro, sed ĉu ni ne trovos iam pli oportunajn formojn ol tiuj malbelaj “-acio” kaj “-acii”? Ofte mi sopiris al “mediado” kaj “arbitrado”.

* * *

Ne pli grandan komplimenton oni povas fari al interesa verko ol diskuti pri ĝi. Tio pravas la riĉecon de ĝia enhavo. Mi deziras al Prof. Lapenna grandan rondon de legantoj. Ni multon lernos kaj gajnos klarecon samtempe kun informoj kaj ĝenerala vido.

Edmond Privat.

***Kroniko Japana**, el ĉin- kaj japan-lingva originalo tradukis Kyūiti Nohara. Eld. Japana Esperanto-Instituto. Kvin volumoj papere binditaj: entute 818 paĝoj 22 × 15 cm. Prezo 25 ŝil., afranko 1ŝ. 6p. (apartaj volumoj ne vendataj).

S-ro Nohara, kiu jam tradukis kelkajn Japanajn klasikojn, nun donas al ni ĉi tiun grandan kaj gravan verkon, tradukon de la *Nihon-Gi*, unu el la du plej fruaj Japanaj klasikoj. Kompilite je la komenco de la oka jarcento p.K., *Nihon-gi* uzis jam ekzistantajn dokumentojn, oficialajn kaj privatajn, kaj diversajn legendojn pri la mondkreiĝo, la ĉiela deveno de la Japana popolo, kaj la vivoj de la plej fruaj Mikadoj. Ĝi rakontas por ni, kiel la Dio Ninigi, nepo de la Sundiino Amaterasu, malsuprenvenis al unu el la insuloj de la estonta Japanujo kaj fariĝis prapatro de la unua Mikado: sekvas kroniko pri la ĉefaj okazintaĵoj ĝis la jaro 696 p.K.

En efektiveco tamen, la rasorigino Japana estas perdita en la nebulo de la pratempo. Verŝajne la popolo venis al la insuloj el la kontinento, kaj inter la linioj de la kroniko, la historiisto povas legi, kiel la invadintoj iom post iom subigis la enloĝantojn, ĝuste kiel tiuj mem antaŭe forpelis alian rason indiĝenan, kiu loĝis en "putoj" en la tero. Historio, en la vera senco, komenciĝas nur en la dua volumo (660 a.K.), sed ĝi estas historio tiel miksitita kun legendo kaj tiel nebuleca, ke estas tre malfacile konstati, kio efektive okazis. La sekvintaj mil jaroj tamen estis epoko de firmigo kaj evoluo, ĝis (500 p.K.) la enloĝantoj fariĝis unu nacio, miksaĵo el la praaĵ enloĝantoj kaj la invadintoj. Ĉi tiu antikva kroniko, kun la en ĝi trovataj postsignoj de tiaj aferoj, kiaj

divenado, juĝodecido per bolanta akvo, la uzo de magio kontraŭ la malamikoj, k.t.p., estas altgrade interesa por la antropologo.

Ankaŭ la studanto de la historio de religioj trovos multon interesan en la menciitaj ritoj, ceremonioj kaj kredoj. La praa religio de la Japanoj (Ŝinto) estis miksaĵo el panteismo kaj adorado al prapatroj aŭ herooj. Estis multe da dioj kaj diinoj, pri kelkaj el kiuj troviĝas belaj kaj ĉarmaj legendoj. Post la enkonduko de Budhismo en la jaro 552 tamen, sekvis periodo de konkurado inter la nova kaj la malnova religioj: tre interesaj signoj de tiu konkurado troviĝas en la kroniko. Poste ili tiel intermiksiĝis, ke ili fariĝis malfacile distingeblaj, ĝis fine Budhismo venkis, post sorbo de la pligranda parto de Ŝinto.

Ĉi tiu estas vere grava aldono al nia literaturo. Eĉ se la *Kroniko* estas laŭnecese plena de sekaj detaletoj, ĝi estas ankaŭ plena de intereso kaj informo por la historiisto, la antropologo kaj la teologo. Ni gratulas la eldonintojn kaj la tradukinton pro tio, ke ili donis al ni dokumenton tiel gravan. La tradukinto aldonis multajn piednotojn por klarigi malfacilajn vortojn aŭ temojn, iufoje korektante la opiniojn de aliaj komentariistoj. La lingvo estas simpla kaj klara, kaj plejparte korekta kaj bona: kelkaj preseraroj troviĝas en la unuaj du volumoj, sed en la aliaj tri, ili preskaŭ tute forestas. La preso kaj la papero estas bonegaj.

Lingvouzoj ofte ripetitaj, kiujn mi trovas ne aprobindaj: *sekve* (=poste: nur en vol. 1: en la aliaj volumoj *poste* estas uzita), *kun* (per), *ĵus* (ĝuste aŭ tuj), *transloĝis* (transloĝiĝis), *falis malsana* (malsaniĝis), *scii kion faru* (fari), *li estis donata rangon* (al

li estis donata rango), *oferis tributon* (tributis aŭ liveris tributon), *elpuli* (eltiri). En vol. V., p. 3 kaj 9, *estis efektiviĝis* kaj *estu brile prosperu* devus esti 'efektiviĝis' kaj 'prosperu'. Ĉiam misliteritaj estas: *remparto* (anst. remparo), *aprovi* (anst. aprobi), kaj *parankeno* (anst. palankeno). Vortoj ne troveblaj en P.V.: *historiono* (histriono?), *aborigeno* (indiĝeno), *censo* (popolnombrado), *niktereŭto* (?) kaj *piastro* (? ne la monero).

J. S. Dinwoodie.

Nia Lernolibro, Jac. Lem. Eld. Federacio de Laboristaj Esperantistoj en la nederlandlingva regiono, Heemstedestr. 44, Amsterdam, W, Nederlando. 170 p. Prezo broŝ. 2.50 ned. guld.

Nemirige, ke jam 6 eldonoj elĉerpiĝis kaj ke jam 18,000 ekzempleroj trovis sian vojon, ĉar pri ĉi tiu lernolibro estas direbla multe da bono. La manuskripton uzis la aŭtoro, kiam li antaŭ 20 jaroj per radio instruis Esperanton speciale al laboristoj. Tial li klarigas ne nur la internacian lingvon, sed ankaŭ multajn gramatikojn malfacilaĵojn de la nederlanda. Kaj tion li faras en laŭdinda maniero!

La titolo parolas malkaŝe kaj honeste pri *nia* lernolibro. Neniu uzanto do havas rajton por plendi, trovante diversloke en la taskoj frazojn, kiuj propagandas la propran unuiĝon, la socialismon kaj S.A.T.

Aldone ni pri papero, preso kaj la tuta tehniko aranĝo menciuj, ke ili estas kiel ĉiuj eldonaĵoj de tiu ĉi Federacio: altkvalitaj. P.H.

Esperantista Vivo

Geedziĝo

Visser-Mabesoone. F-ino Suus Visser kaj S-ro Paul Mabesoone, kasisto de L.E.E.N., en Hilversum, Nederlando, je 8 decembro 1951.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Blaas, D-ro Leopold, lektoro de Esperanto ĉe la universitato Innsbruck, Direktoro de la Ŝtata Esp.-Ekzamenkomisiono, membro de UEA en Natters bei Innsbruck, Aŭstrujo, je 29 novembro 1951, 61-jara.

Freund, S-ro Siegmund, U.E.A. membro en Ramat-Hashavim, Izraelo, je 3 novembro 1951.

Grahl, S-ino Olga, en Bergen, Norvegujo, je 9 novembro 1951.

O'Connor, F-ino Lily, en Melbourne, Aŭstralio, je 17 septembro 1951, 72-jara. Dumviva Membro de U.E.A.

Rodríguez Pérez, S-ro Domingo, U.E.A. membro en Montevideo, Urugvajo, je 9 novembro 1951.

Schäfer, S-ro Paul, U.E.A. membro en Hagen, Germanujo, je 20 oktobro, 78-jara.

AKTUALAJ PROBLEMOJ

de la

NUNTEMPA INTERNACIA VIVO

D-ro Ivo Lapenna

Vidu recenzon p. 48

Prezo 10 ŝil., aŭfranko 6p.

Mendu ĉe U.E.A.

Enigma Konkurso N-ro 65

Solvojn sendu al S-ro P. H. Mooy, rue Stuyvenbergh 28, Brussel II, Belgujo.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 63.

N-ro 138. Bono farita ne estas perdita. Antaŭmetu: meb - afo - fon - bro - amf - ana - bor - epi - est - kra - gan - ane - ele - abs - het - dia - bas - hip - ase - cir - pud - gri - art - bla.

N-ro 139. Oni ekkonas bovon per la vido kaj malsaĝulo per lia rido.

N-ro 140. Babilas, muelas, kion lango elpelas. Intermetu: mbi - raj - rbe - nik - jlo - nag - ksi - rma - bur - zer - ale - las - ksu - rki - mia - ton - gna - alo - vac - gna - oga - lom - leo - rlo - mpo - ĝen - bli - rak - jst.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 61-a konkurso: S-ro J. Escaré (Franc.) 184, S-ro G. Englert (Germ.) 179, F-ino N. E. Powers (Angl.) 175.

Enigmo N-ro 143. a - a - a - ar - cen - co - de - de - e - ga - go - i - in - ka - ka - ka - kal - ki - ko - ko - kor - len - lo - lo - me - mo - no - o - or - pi - re - ri - ro - roj - scep - se - si - so - taj - ti - to - tri - tro - tu - ve - vi - zi.

El la ĉi-supraj 47 silaboj formu 14 sepliterajn vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj. La unuaj literoj de tiuj vortoj, legitaj de supre malsupren kaj post tiuj la mezaj literoj, legitaj de malsupre supren, formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. ne estante plu en uzado; 2. scienco pri la versaj metroj; 3. gliptikaĵo kun konkava gravuro; 4. korpoparto; 5. bela floro; 6. fino de verko; 7. superregado; 8. danĝeraj kreskaĵoj; 9. fungo; 10. ne fari bruon; 11. ŝipo; 12. forta deziro; 13. kritike raportoj; 14. helpanto.

Enigmo N-ro 144. La vortoj de kvin esprimoj el la Proverbaro de D-ro Zamenhof intermiksiĝis. Mi donas ilin en alfabeto sinsekvo, kaj vi bonvolu trovi la esprimojn: afabla, almozpetanto, amas, ambaŭ, apud, brikon, ĉiu, ĉiuj, dentoj, domon, donas, dronanto, eĉ, enĉius, estas, kion, kun, la, langon, malplena, manĝotablo, mi, mi, min, mordas, ne, ne, plena, proponas, restas, saĝuloj, sako, savito, scias, sciis, se, sinĝena, sin, tamen, tre.

Enigmo N-ro 145. adi, ako, akv, alo, ank, ant, ara, ato, bar, bro, bun, dip, ead, eno, erk, esk, gar- gio- gmo, gvi-, iat, ife, ile, ilo, ipo, ise, ist-, ito, ivo, izo, kat, kio, kol, kra, lin, lom, mbo, mif, nda, oĝi, oĝo, oli, opo, opo, oro, pal, pal, par, per, per, pet, pro, pro, psa, psi, rdo, rio, rom, sek, sep, sil, smo, sta, sto, tel, tem, teo, tii, tio, tor-, tot-, tra, tri, tub, ugo, ulo, und, ver, ves, zel.

El la ĉi-supraj 81 litergrupoj faru 27 naŭliterajn vortojn laŭ la ĉi-subaj klarigoj. La mezaj literoj formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. Ranunkolo. 2. Politikisto. 3. Dua. 4. Logika rezono. 5. Batalanto. 6. Tombejo. 7. Sciencisto. 8. Transportilo. 9. Optika ilo. 10. Kuracilo. 11. Flago. 12. Burleskigi. 13. Politika reĝimo. 14. Pratipo. 15. Korto. 16. Kolorkvietigilo. 17. Filologo. 18. Regadsistemo. 19. Kontraŭputriĝa. 20. Modela tabelo por deklinacio. 21. Varbito. 22. Pesaparato. 23. Juĝistaro. 24. Konturo. 25. Monato. 26. Timata tubereto. 27. Marfiŝo.

A. C. Blatt

La Signifo de Esperanto por la Oriento

UNUE mi devas komprenigi la gravecon de tiu ĉi kulturamaso kaj por nia movado kaj por la homaro—sen tio mia raporto ne havas kialon—ĉar mi mem, kvankam mi tre interesiĝas pri Azio, komprenis ĝin nur danke al miaj longaj vizitoj al Korelando kaj Japanlando.

Rigardu vian 1950-an Jarlibron. El tuto de 18,749 UEA-membroj, 43 estis Orientanoj—por pli ol duono de la homaro! Krom en Japanlando, tio spegulis la staton de nia movado en Azio. Ĉu la kialo estas ekonomia? Ne. Grandparte la kialo estas, ke al Orientanoj nia movado estas ankoraŭ Okcidenta, ne tuthoma.

Multe oni aŭdas pri la “ondo de naciismo” en Azio. Tio estas nur rezulto. La ondo estas strebo al egaleco en la homaro. “Vi Okcidentaj regantoj de nia planedo ne akceptas nin kiel egalulojn”, diris Orientanoj. “Do ni devas strebi al egaleco kun vi en ĉiu kampo, ankaŭ en la kampo de potenco.” Tiel okazas forta pelo al militoj kaj al mondmilito. Eĉ pro tio la egaligo de Orientanoj en la homaro estas urĝa bezono por la tuta homaro.

Nur la Okcidentanoj de la Esperanto-movado povas tion sensange plenumi! Plej urĝa praktika ago por la homaro estas, ke Komitato de Okcidentaj Esperantistoj, oficiale aŭ ne, venu al Azio por bonvenigi la Orientanojn de ĉiu Azia kulturamaso en la homaron!—sur bazo de tuta egaleco. Nur la Esperanto-movado povas tion fari. Kiam oni kunsidas en hejmo de amiko kaj babilas en la tuthoma lingvo, ĉiuj sentoj de gentaj diferencoj kaj malegalecoj forfandiĝas. Oni estas nur homoj!


La Japana Esperanto-movado estas la sola forta movado en Azio. Ĝia sukceso devenas de multaj kaŭzoj, sed la plej profunda forta sopiro de multaj evoluintoj estas partopreni en vigla tuthoma kunvivado, kio cetere estas ĉiea sopiro en Azio. Ĉion pri la Japana movado kaj ĝia homa ĉirkaŭo mi komprenis nur danke al la multaj spertoj de mia longa vizito.


Hazarde mi tuŝis tiun ĉi landon en 1947 survoje al Korelando. Mi tre ĝojis veni al Azio sed ne al Japanlando. La memoroj pri nelonge pasinta milito estis ankoraŭ tre freŝaj. Tamen, tre surprize mi konstatis, kiam mi

Ponto ĉe

Pusan, Koreo

*(Ni dankas al
Eldona Societo,
Stockholm,
pro la prunto.)*





La kastelo ĉe Osaka, Japanujo

renkontis Koreajn samideanojn, ke ili sintenis plenamike kontraŭ Japanaj Esperantistoj. De miaj amikoj Koreaj mi ricevis adreson en Japanlando kaj vizitis ĝin dum Majo 1949. Oni malfermbrake bonvenigis min. Septembron 1949 mi translokiĝis al Japanlando kaj de tiam restas kaj vivas, kiel en Korelando, kun Esperantistoj kaj per ilia helpo. Por koniĝi kun Esperantistoj, vivi Japanmaniere, rekte sperti ĉilokajn kutimojn, mi deziris tuj aĉeti Japanan domon. La tuta Esperantistaro serĉis kaj trovis: tie sidante sur kusenoj sur pajla planko, manĝante per manĝbastonetoj, ni (mia edzino kaj mi) tre ofte bonvenigis multajn samideanojn. Tiam ni povis interviziti ofte, kaj ni ankaŭ komencis, per Esperanta helpo, studi la Japanajn scenon, kutimojn, manĝaĵojn, vestojn, pentraĵojn, teatron, muzikon, literaturon kaj ĉion, kio interesis nin.

Sed por priskribi la multajn servojn, kiuj helpis nin kompreni kaj ekzisti, kiujn la ĉitiea Esperantistaro faris por mi kaj mia edzino, mi bezonus libregon.

Nur post longa restado mi ekkomprenis kiel vasta estas nia movado ĉi tie. Ĉe mia bonvenigkunsido en Tokio estis proksimume la sama nombro da samideanoj kiel en Korelando. Sed kiam mi komencis vojaĝi al aliaj urboj mi renkontis multajn samideanojn ĉie. Ĉie estas kursoj, ĉie oni ofte kunsidas. Ŝajne la vizitoj de alilandaj samideanoj multe instigas ilin, ĉar mi ricevis invitojn de samideanoj el multaj urboj, urbetoj, vilaĝoj. Kaj ĉie mi trovis, ke oni lerte parolas Esperanton.

Kiel en Korelando, mi trovis la plej altan klerecon inter samideanoj. Nur kelkaj el ili volonte partoprenis en la dua mondmilito. Tiam estis danĝere malkaŝe diri, ke oni estas Esperantisto,

kaj multaj pro tio suferis.

La Japana movado komenciĝis tre frue. Maristo portis "la bonan novaĵon" al Jokohamo. Kaj jam en 1906 aperis la unua lernolibro. De tiam la movado eldonis multajn librojn el ĉiuj fakoj. *La Orienta Revuo* aperas regule ĉiumonate.

La du kongresoj kiujn mi partoprenis estis bone vizitataj. Oni festas Zamenhof-tagon kaj ankaŭ Komenc-tagon de Esperanto—kiam la unua libro aperis.

Tiamaniere ĉiujare oni elpensas kaj komencas novajn pli efikajn metodojn per kiuj antaŭenigi la movadon. Kaj tiamaniere la movado evoluas. Tamen, la vizitoj de Okcidentanoj estas la plej instigaj. La nerenkont-

eblaj renkontiĝas. La du plej apartaj duonoj de la homaro unuiĝas. Venu . . .

Kompreneble, oni parolas pri la unua Universala Kongreso en Azio. Kiam? Kie? Ĉu en Japanlando? Mi esperas ke ne; ni kongresu en loko kie nia movado estas ankoraŭ malforta kaj instigu ĝin. Sed justa averto. Ne multaj el vi okcidentaj samideanoj povus kontraŭstari la allogon de la Oriento—kie oni ofte kantas

*Homoj en la Oriento
Homoj en la Okcidento
En la sud' kaj en la nord'
Alte teni homan nomon
Kore ami ĉiun homon
Estu nia liga vort' !*

daŭrigo (de p. 58)

se ĉi tiu lastjara teorio estas vera, gravito obeas la saman leĝon; kaj se la suno tiele neniĝus, la tero daŭre cirkulus laŭ elipso, kiel nun, ĉirkaŭ ĝia eksloko dum ok kaj duono minutoj plu, antaŭ ol forflugi laŭ tangento en fremdan malplenenon.

Iuj deduktis el la sukceso de la teorio de relativeco, ke Protagoras estis prava dirante, "La homo estas la mezurilo de ĉio", t.e. ke inter ĉies vidpunktoj ekzistas nenia absoluta vero. Tiu dedukto ne estas vera, ĉar Einstein asertas absolutecon, sed ne tie, kie oni atendis. Krome la teorio nenion tuŝas ekster la fiziko. Aliaj deduktis el la teorio, ke ekzistas dato, kiam komenciĝis la estanta evoluo de la universo, kaj ekzistos dato de ĝia senenergia morto. Tiujn deduktojn detruos Hoyle, se li sukcesos pruvi la teorion de McRae pri *senĉesa kreiĝado*, pri kio samideanoj povas legi en *Scienca Revuo* 1949 dec. p. 153.

Ni serĉas

**akcelantojn, kunlaborantojn kaj
oficejestrojn**

por nia

Interligaj Sekretariejoj

en

Amsterdam, Baltimore, Bruselo,
Helsinki, London, Marseilles, Los
Angeles, Miami, Monako, Montreal,
Paris, Roma, Stockholm,
precipe

el rondo Esperantistaj.

La agrondoj :

Saneco, Bonfarto, Sporto

Internaciaj malsanul-asekuraj aferoj

Ekonomio, Inventoj, Debato

Informojn donas

La Interliga Sekretario por la

Germana Liga Teritorio

Kirschallee 5—II, Bonn, Germanujo

Bonvolu aldoni int. respondkuponon



Por via distro

Sendu vian plej amuzan anekdoton al M. Otiel, ĉe U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. Antaŭdankon

Malagrabla dilemo.

Maljuna kaj tial jam laca kamparano deziris fine transdoni sian bienon al sia malplej juna filo jam sufiĉe aĝa, sed ĉi tiu pruviĝis obstina fraŭlo. Ĉiuj provoj de la patro lin edzigi fiaskis. Fine la kamparano koleriĝis kaj ordonis al la filo, ke li alvenigu bofilinon. La filo cedis, sed kun ĉagreno en voĉo kaj mieno li grumblis:

“Por vi estas facile paroli! Vi edziĝis kun mia patrino, sed mi devas preni knabinon tute fremdan!”

Leterportistoj

Filo: Paĉjo, ni ludis leterportistojn

hodiaŭ posttagmeze. Ni donis al ĉiuj homoj je la strato leteron.

Patro: Jes, Joĉjo, sed de kie vi havigis la leterojn?

Filo: Ha, patro, ili estis en via skribtablo. Ĉirkaŭ ili estis rozkolora rubando, kaj ili odoris kiel jasmeno.

Kial ne?

Edzo: Dum la nokto mi sonĝis, ke vi kaj mi ĉeestis balon ĉe la reĝa palaco.

Edzino: Kiel bele! Ĉu la princino ĉeestis?

Edzo: Stultulino! Vi devus scii ke ŝi ĉeestis; vi estis tie kiam mi dancis kun ŝi.

Kio estas via V.-K.?

Kompilas S-ro A. S. Beuker, Nov-Zelando.

Divenu la ĝustajn en la signifoj ĉe la sekvantaj vortoj. Se vi ĝuste elektas ĉiujn, via Vort-Kvociendo estas 100. Tamen deprenu 10 por ĉiu miselekto (Respondoj sur p. 64)

1. **Fezo**: (a) idolo, (b) naŭzaodoro, (c) Turka ĉapo?
2. **Dieto**: (a) muzika signo, (b) speciala nutromaniero, (c) oficiala ordono?
3. **Istmo**: (a) mallarĝa intermara terkolo, (b) malsano, (c) iu doktrino?
4. **Jogurto**: (a) speco de boato, (b) kazeigita lakto, (c) Hinda asketo?
5. **Kompromiti**: (a) meti en riskoplenan situacion, (b) elsavi, (c) malsimpligi?
6. **Kronika**: (a) rapide pasanta, (b) strangea, (c) longedaŭra?
7. **Profilo**: (a) fihomo, (b) vizaĝo flanke rigardata, (c) speco de herbo?
8. **Oligarkio**: (a) sistemo de familia regado, (b) arbeto, (c) frukto?
9. **Rigida**: (a) mildega, (b) movema, (c) nefleksebla?
10. **Skuno**: (a) speco de ŝuo, (d) dumasta velŝipo, (c) bulko?

George Rust :

Kion Diras Einstein ?

Einstein naskiĝis en Germanujo en 1879. Kiam en 1914 la imperiestro postulis, ke eminentaj intelektuloj subskribu deklaron, ke Germanujo pravis ekmilitante, Einstein estis inter la refuzantoj subskribi. En 1933 li migris en Usonon. Li estas judo laŭ gento ; sed laŭ filozofio li ne kredas je ia libereco en la homa volo. Li estas firma amiko al monda paco. Oni petis, ke Einstein priskribu la batalilojn, kiujn oni verŝajne uzos en tria mondmilito. Li respondis, ke li ne volas tion antaŭdiri, sed ke li priskribos la batalilojn por la mondmilito kvara. "Kiajn ?" oni demandis. "Rokojn !" li respondis.

KIAM montesplorantoj sinsekve interkonkuras grimpante grandan monton, ĉiu sukcesanto atingas pinton pli solecan sed malpli facile alireblan ; simile ĉiu eltrovanto en teoria scienco malkaŝas principon pli simplan sed malpli facile kompreneblan. Tiel agis Newton en 1685 dirante, ke la falo de pomo kaj la rondiroj de planedoj estas regataj laŭ unu ĉiea leĝo—gravito—kiu estas tiel miriga, ke ni ĉiuj kun sana instinkto unue malkredis ĝin. Tiel agis ankaŭ Clerk Maxwell en 1855 pruvante, ke la kampoj de elektromagnetismo kaj lumo estas regataj de la samaj ĉieaj ekvacioj. Simile la leĝoj de Einstein estas mallonge redaktitaj, sed nur per tiaj terminoj, kiaj *imagaj nombroj*, *matricoj* kaj *tensoroj*.

Spaco kaj tempo

Kio en la universo estas senmova ? La *Piramido de Cheops* galopas ĉirkaŭ la terglobo po 24 km. en minuto ; la terglobo kuregas ĉirkaŭ la suno ; la tuta planedaro forvojaĝas en la direkto al la stelo Vega ; kaj ĝi kaj Vega kun nia tuta galaksio (t.e. la *Lakta Vojo* da astroj) laŭ nunaj teorioj for de la ceteraj galaksioj reciproke disflugadas. Se ni, la videblaj astroj, estus familio da naĝantaj korkoj balanciĝantaj meze en Atlantiko, ni ne povus mezuri niajn distancojn de Afriko kaj Brazilo por konstati, ĉu iu korko el ni estas senmova ; sed ĉu ni

povus tion konstati observante la apudan akvon ? En 1887 Michelson kaj Morley provis mezuri nian moviĝon tra la lumportanta etero, kaj trovis tute nenian ateston pri ia traetera moviĝo ĉe kiu ajn punkto de la terglobo rondiro.

FitzGerald kalkulis en 1893, ke se (kiel jam ŝajnis probable) ĉia *solida* materio estas nun kunplektaĵo el reciproke malaj elektroj, necese estas, ke ĉiu materia mezurilo (ĉu metrobastono, ĉu homa okulo) ien moviĝante, mallongiĝu laŭ la mova direkto ; ni neniam povas pruvi tion, ĉar ĉiaj mezuriloj regule mallongiĝante komplotas kaŝi inter si la mallongiĝon ; sed laŭ la teoria kalkulo, por duonigi laŭ longeco metrobastonon, sufiĉus transloki ĝin po 176.000 km. en sekundo. Sed lumo vojaĝas po ĉiam 300.000 km. en sekundo kaj neniam pli. Ĉu ni ne povus determini nian rapidon tra la etero per tio, ke lumo el foriranta astro venus pli malrapide, kaj el proksimiĝanta astro pli rapide ? Ne ; ĉar jam ŝajnas, ke se *u* kaj *v* estas du adiciotaj rapidoj, kaj *c* estas la rapido de lumo, la sumo de *u* kaj *v*

estas ne $\frac{u+v}{1+\frac{uv}{c^2}}$, sed $\frac{u+v}{1+\frac{uv}{c^2}}$

Einstein diris en 1905 "*Maleble estas per kia ajn eksperimento determini absolutan senmovecon*"; tio estas la Mallarĝa Teorio de Relativeco. Tio signifas, ke du observantoj malsame

moviĝante (ekzemple sur du astroj) mezurus malegale la spacon inter du punktoj pro siaj malegale ŝrumpintaj mezuriloj; simile oni povas pruvi, ke ili malegale mezurus la tempon inter du samlokaj okazaĵoj. Sed tia konflikto pri spaco kaj pri tempo (Einstein montris) malaperas se oni atentis nur *spactempon*, miksaĵon el ambaŭ; oni ne diru, ke Romo estas for de Parizo kelkajn kilometrojn da spaco, nek ke la morto de Cesaro antaŭas la kronadon de Napoleono kelkajn jarojn da tempo, sed ke la *intervalo* (t.e. diseco) inter Romo 44 a.K. kaj Parizo 1804 p.K. estas kelkaj unuoj da spactempo. Tiel imagate atomo ne estas unumomenta buleto de tri dimensioj moviĝanta laŭ kvara (t.e. tempo), sed senŝanĝa linio kuŝanta en kvar dimensioj; kaj la korpo homa estas (se mi rajtas ŝangeti diron de Eddington) laŭ la vido de Dio nur kvardimensia vermo. Tia *mondlinio* kaj tiuj *intervaloj* ne ŝanĝiĝas pro la rapideco de la observanto, sed restas (laŭ Einstein) absolutaj.

Gravito

Kiam dum la milite nigritaj noktoj mi veturis omnibuse laŭ konata vojo kaj deziris scii per la deklivoj kaj kurbiĝoj, ĝis kiu punkto de la veturo ni atingis, mi neniel povis distingi inter vojo dekstre pli alta kaj vojo dekstren kurbiĝanta, nek inter vojo deklivon grimpana kaj omnibuso akceliĝanta. Einstein diris en 1915, ke en la fiziko maleble estas iel distingi inter la rezultoj de *gravito* kaj de akcelo. Ni ne bezonas la hipotezon *graviton*, se ni nur supozas, ke la spactempa kontinuo ricevas kurbiĝon en la proksimeco de masaj korpoj. Se sensperta kampadanto sternus sian kaŭĉukan dormmaton sur molan marĉan grundon kaj metus meze sian

pezan tornistron, la tornistro suben premus la mezan parton de la mato; se li post tio rulus pilketojn trans la maton, ili emus sin direkti al la tornistra valetio. "*Mi trovis ion*" li krius, "*la tornistro posedas graviton al la pilketoj!*" Sed ne; la dudimensia supraĵo ricevis kurbiĝon en trian dimension; jen la vera klarigo. Tiel ankaŭ ĉe la naturo: la kvardimensia spactempa kontinuo kurbiĝas en ankoraŭ pluajn dimensiojn, kie ajn troviĝas proksimaj korpoj.

Einstein tion diris en 1915, kiam Eŭropo ne atentis, havante alian distron. Sed en 1919 dum eklipso suna li pruvis la teorion; ĉar tiam stelo, kiu laŭ kalkuloj devis esti kaŝita malantaŭ la nigra suno, ja aperis al teraj okuloj tial ke lumaj radioj preter la sunan randon pasante, sin fleksis pro ĉi tia kurbiĝo de spactempo kaj atingis la teron anstataŭ perdiĝi en la malplenon. Kio? Ĉu lumoj kaj energio havas pezon? Jes, se vi ankoraŭ preferas la malnovan terminon gravitan; kaj kontraŭe, la peza materio povas fariĝi energio, kiel vi povas lerni de la loĝintoj de Nagasaki kaj Hiroŝima.

Lumaj radioj

En 1949 Einstein metis la suproŝtonon sur sian konstruaĵon publikigante (per pluaj matematikaj simboloj) sian *unupecan kamp-teorion*; per tio li unuigas la leĝon pri *gravito* kun la leĝo pri elektromagnetismo. Ni eĉ antaŭe povis kalkuli per la konata rapido de lumoj, ke, se iarimede la suno subite neniĝus, ni povus ankoraŭ dum ok kaj duono minutoj ripozi en niaj bankalsonoĵoj sur varmaj sablejoj laŭmode brunigante en ĝia agrabla gaja brilo, antaŭ ol surteriĝus frosta nokto senfina. Sed,

daŭrigo sur p. 55

Belartaj Konkursoj 1951 : Prozo Originala

T. K. Slade

2-a premio

Fabelo

Lao-Tsze en Londono

DUFOJE mi renkontis lin. Ĉirkaŭ ambaŭ renkontoj ŝvebas mal-realeco : pri la dua mi eĉ dubas ĉu mi ne iomgrade hipnotiĝis kaj nun memoras tion, kio ne vere okazis.

La unua renkonto okazis en sufokiga Aŭgusta tago. Dum la tagmanĝoro, ne kuraĝante fronti viandon en kafejo, mi aĉetis iom da frukto kaj sidis sur benko en polveca, sunbakita nord-Londona parko. La platano malantaŭ la benko provizis ombron, kiu neniom malgrandigis la varmegon : ĝi influis nur la kvaliton ne la fortecon, kaj enirante ĝin oni sentis la varmon kvazaŭ malpli brua.

De sub mia platano mi povis rigardi trans etendaĵo de mallonga bruna herbo, super kiu aperis tiu ŝanceliĝa vapor-danco videbla dum tia vetero. Krom tiu senripoza tremeto neniam moviĝo. Malmultaj homoj estis videblaj, kaj ĉiuj el tiuj senmove kuŝadis.

Tiam mi rimarkis maljunulon alproksimiĝanta laŭlonge de la vojeto. Tre maljuna mi sendube taksis lin, kvankam je tia distanco mi certe ne rajtis juĝi. Lia progresado estis stranga, malrapida sed tre facila, senpena kaj, same kiel multo kiun mi poste eksciis pri li, malfacile priskribebla tamen rimarkinda.

Alveninte al mia benko li sidiĝis kaj, demetante la ĉapon, li forviŝis ŝviton de sia frunto per granda poŝtuko.

"Terure varme", mi gambitis anglomaniere.

"Estas belega vetero", li respondis.

"Tro belega por mi, apenaŭ mi povas spiri."

"Pro tio, ke vi estas juna", li diris kun luma rideto.

Nu mi tiam estis pli ol kvardekjara, kaj certe aspektis neniom pli juna : mi sentis min iom incitita,

"Ĉu la maljunuloj spiras pli facile ol junuloj ?" mi demandis.

"Tute ne, kiel vi bone scias. Tamen la junuloj kaptivolas ne nehavatan, eĉ la nehavetlan."

La demanda signo sur mia vizaĝo sekvigis klarigon :

"Atentu la havatan, ne ĉagreniĝu per volo al la nehavata ! Vi sidas, sufiĉe komforte, vi manĝas pomojn, estonte vi povos fumi per tiu elmordita pipo videble elstaranta el via vestpoŝto. Atentu nun zorge, ĉu vi ne sentas tiun bloveton de la sudo ?"

Kaj mi certe sentis tian dolĉan bloveton.

"Ne," li diris, tutklare legante miajn pensojn, "ĝi tiel blovis dum la lasta horo ; vi nur ne atentis ĝin."

Mi skuis min sur la benko por rekte fronti lin :

"Ĉi tio estas rimarkinda," mi diris, "mi ne plu sufokiĝas. Ĉu vi estas magiisto ?"

"Trankviliĝu", li respondis, "vi mem hejtis vin. Ne tordiĝu tiel, nek korpe nek mense."

"Kion vi volas diri ?"

Malrapide li skuis la kapon : "Ne, la vortoj ne potencas. Ilia pleja bono estas nur instigi mediton. Restas al vi kapti la ideon."

"Donu, do instigan vorton !"

Dum minuto li ridetante silentis, iom dube. "Eble *Kvieto* kondukos vin; aŭ plibone *Malpeno*," kaj levigante li salutis min kaj malrapide foriris laŭ sia stranga, flua irmaniero.

Restante tie mi iom kirliĝis mense: ĉu vere mi refreŝiĝas, aŭ ĉu mi estas trompita? Ĉu la maljunulo influis sur min per sugestio? Kiel ajn estu, mi volonte daŭrigus la interparolon, kaj mi turnis min por rigardi la maljunulon dum li iradis en la malproksimon. Mi sentis plenan konvinkon ke estus neutile sekvi lin, ke mi ricevus nur ĝentilan malaldonon.

La renkonto faris sur min tiel fortan impreson, ke dum semajnoj mi ofte vizitis la parkon esperante ree renkonti lin: sed vane.

* * *

En la sekvanta Novembro okazis la dua renkonto, kaj lasis sur mi eĉ pli fortan impreson.

Post foriro de la oficejo mi deflankiĝis de mia hejmvojo por aĉeti varetojn en Clerkenwell.* Subite mi rimarkis antaŭ mi la maljunulon kun lia nemalrekonebla irmaniero. Li ŝajne ne rapidis, tamen mi devis multe rapidi por atingi lin.

"Tre malsimile hodiaŭ," mi diris... estis ja akra vento sub malhelaj nuboj.

Kun rekonanta rideto li respondis per preskaŭ identaj vortoj kiel antaŭe: "Tamen estas ankoraŭ belege. Kaj vi, ĉu vi ankoraŭ sopiras plibeligon?"

"Mi ja ne plendas," mi skermevitis, "mi nur rimarkis egan diferencon."

"Kaj per tio vi montras vian progreson."

Tiuj vortoj estigis en mi plej absurdan senton de naiva fiero; samtempe mi demandis min kial mi tiel alte taksas lian aprobon.

* Londona urbparto kie abundas horloĝist-butikoj.

"Mi ĝoje aŭdas tion, tamen mi ne klare komprenas la sencon de tiuj vortoj."

"Kompreneble, ĉar la senco ne kuŝas en la vortoj."

"Por kio, do valoras vortoj?"

"Por nenio grava: por signifo kaj tiaj bagatelaĵoj."

Mi ekridis laŭte, tiel ke preterpasantoj surpriziĝis, kaj respondis: "Diru, do, kio valoras."

Li haltis kaj rigardis profunde en min. Mi vane serĉas vortojn por klarigi miajn sentojn, kiuj estis preskaŭ nepriskribeblaj. La rigardo, sen kutima rideto, estis serioza, eĉ severa: kaj li ne rigardis sur min sed en min.

"Ĉu vi disponas tempon por viziti mian laborejon?"

"Tre volonte."

Li prenis mian brakon, kaj brakoĉe-brako ni antaŭeniris. De tiu momento mi malfidas miajn impresojn. Supozeble ni parolis, sed ne multe, kaj nur bagatele. Mi memoras trapason de *Old Street*, sed post tio mi ne memoras la vojon, kvankam la distrikto estas bone konita de mi. En malgranda flankstrato li haltis:

"Jen ni," li diris, kaj flankeniĝis por lasi min eniri, kaj tutapude sekvante min li fermis la pordon.

Ekstere la strato ne estis brua, sed interne la domo strange silentis. Tamen mi forte sentis, ke muziko ĉirkaŭis min, kvankam mi ne povis aŭdi ĝin. Li malfermis pordon kaj ni eniris ĉambron kiu tute akordis kun la distrikto, fakte ordinaran horloĝist-laborejon. Apud la fenestro staris malordigita stablo, kun aro da renversitaj, senpiedaj vin-glasoj, kiuj ŝirmis dispecigitajn poŝhorloĝojn. De hokoj sur la apuda muro pendis aliaj, kaj ĉirkaŭ la ĉambro estis multaj

horloĝoj el ĉia speco kaj granda.

"Ĉu vi iam enrigardis homan koron?" li demandis, deprenante poŝhorloĝon de sur hoko kaj proponante ĝin al mi.

Mi enmanigis ĝin kaj, post ekrigardo, levis okulojn kun senvorta demando.

"Kompreneble vi bezonas fakulan okulvitron," kaj li pasigis al mi tian malgrandan lenson kien horloĝistoj tenadas tiel lerte en la okulkavo. Kun forta streĉo mi penis enokuligi ĝin, kaj plurfoje, antaŭ ol mi povis enrigardi, ĝi obstine eksaltis.

"Ne gravas," li diris; "tenu ĝin per unu mano kaj observu la koron."

Tiel farante, mi eligis krion: "Sed tiu ne estas poŝhorloĝo!"

"Tion mi ne diris", estis lia respondo.

Kion mi vidis mi tute ne povas priskribi, sed tie estis movo, kaj koloro, multaj koloroj, kaj rigardante ĝin mi sentis dolorigan, senesperan depremecon.

"Tiu estas difektita, alie ĝi ne troviĝus ĉi tie. Sed ĝi ree funkcias, kvankam malĝuste, kaj post iom da tempo ĝi ritme taktados."

"Ĉu vi volas diri, ke vi sen-difektigadas frakasitajn korojn?"

"Ne. Tion povas nur la koro mem, sed mi povas helpi."

"Kiamaniere vi povas helpi?"

"Mi malstreĉas la risortojn. Mi estas apostolo de malstreĉiĝo... kaj oni lernas tiun lecionon nur tre malrapide."

"Sed malstreĉita horloĝo ne povas funkcii."

"Mi ne pritraktas la ĉefrisorton. Kiam tiu malstreĉiĝas la homo mal-aperas; estas tamen multaj kromaj risortoj."


"Kiu vi estas?" mi demandis urĝe.

Li levis la manon, indikante nomon super la fenestro... kaj nun ni staris en la strato... "Bona nomo por horloĝisto, ĉu ne? Kaj nun mi dankas vin pro via afabla kuniro; se vi sekvos la unuan flankvojon maldekstre vi atingos tramvojon kiu kondukos vin al la Digo. Bonan Vesperon kaj multajn salutojn!"

Kun freneze kirliĝanta kapo mi forlasis lin.

* * *

Survoje hejmen mi vizitis bibliotekon por konsulti adresaron, sed en la tuta Londono mi ne trovis horloĝiston kiu nomiĝis *Tempus*.




El la Oficejo

Adoptado. Ni ricevis multajn dank-leterojn de samide-

anoj en landoj, el kiuj oni ne povas pagi kotizojn, pro la helpo donita al ili de bonvolaj Esperantistoj en aliaj landoj. U.E.A. mem faris tiom kiom ĝi povas, sed estas neeble sendi la gazeton senpage al ĉiuj pro la alta kosto, ĉar ne plu temas pri kelkaj centoj da samideanoj sed pri kelkaj

miloj... Nia gazeto *Esperanto* por la adoptitoj estas plej ofte la sola Esperantaĵo havebla.

Restas ankoraŭ multaj Esperantistoj en Ĉeĥoslovakujo, Jugoslavujo kaj Pollando kiuj bezonas adoptadon. Se vi havas amikon kiu mem ne povas pagi sed pro kiu vi deziras pagi, bone: se ne, ni en la oficejo volonte trovos por vi adoptoton. La MA-kotizo estas 20 ŝil.



ESPERANTO KAJ RADIO

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
Lundo	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (franclingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 402. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94, rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG. Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala Cd., C. Ameriko.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.30–17.50	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Bittorio Veneto 56.
	18.30–19.00	Madrid. 233m., 42.33m. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.10–17.25	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan ĵaŭdon).
	17.35–17.40	Bern. Kiel lunde. P. D-ro Privat.
Vendredo	17.30–17.50	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (nur la unuan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Officejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 235

5-an Januaron 1952

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de 1951, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de 1950 :

	1950	1951
Asociaj membroj	8988	8849
Individuaj membroj :		
MJ	886	903
MA	4264	4570
MS	288	286
Patronoj ..	15	16
DM	211	260
HM	59	59
	5723	6094
	14711	14943

JARLIBRO. La jarlibro estas nun presata kaj espereble eliros en la fino de Januaro. La jenaj informoj pri delegitoj ne troviĝas en ĝi.

DELEGITOJ

Aŭstrujo

Kalksburg. D : E. Majtanić, frizisto, Breitenfurturstrasse 36, Wien 25—
Kalksburg. Tel : ASP 1 34.
FD (Kosmetiko) : La D.

Finnlando

Lappeenranta. FD(Turismo): E. Tuomanen, Simolantie 6. Tel : 347.

Japanujo

Gihu. D : K. Ozawa, 4 kumi, Okinohasi, Gifu-si.

Hakodate. D : S. Yoshida, ĉe Daiichi Ginko, 11 Suehirocho. Tel : 3210.

Nagoya. D : S. Kawamura, Tōhata-tyō 1-56, Syōwa-ku. Tel : (24) 2571.

VD : M. Niŭa, Kurumada-tyō 2-39, Syōwa-ku. Tel : (4) 1636.

Nara. D : Y. Nozima, Saiwaityō 838.

Yuni-tyō. D : T. Nitta, Mikawa, Yuni-tyō, Yubari-gun, Hokkaido.

Svedujo

Vilshult. D : E. Karlsson, Box 91.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Adhemar de Barros, D-ro, Rio de Janeiro
Brito, S-ro A. de, São Paulo

Azeredo Coutinho, D-ro L. de, Belo Horizonte

Erlindo Salzano, D-ro, São Paulo

Timponi, D-ro L., Belo Horizonte

Portela, D-ro B., Pedra Azul

(ĉiuj en Brazilo)

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1951

291. Hilderico Araujo, D-ro, Vitoria, Brazilo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1952

122. Fygle, S-ro B., Bodø, Norvegujo

123. Maarli, S-ro E., Bodø, Norvegujo

124. Brown, S-ro G. E., Calgary, Kanado

125. Couwenberg, S-ro Fr., Blankenberge, Belgujo

126. Roth, F-ino F., Solothurn, Svislando

127. Steinemann, F-ino E., Bern, Svislando

128. Andersson, F-ino D., Linköping, Svedujo

129. Harlin, S-ro G., Spångenäs, Svedujo

130. Jönsson, F-ino K., Ystad, Svedujo

131. Kalmanowicz, S-ro I., Norrahammar, Svedujo

132. Lundgren, S-ro A., Hälsingborg, Svedujo

133. Malmkvist, S-ro A., Visby, Svedujo

134. Turner, S-ro F., Linköping, Svedujo

135. Eisele, S-ro J., St. Louis, Mo., Usono

136. Amelin, S-ino H., London, Anglujo

137. Mathias, S-ro F. V., Sebaa Aioun, Maroko

138. Ahlin, S-ro E. V., Brovallen, Svedujo

139. Hjorth, S-ro R., Edsviken, Svedujo

140. Sjöblom, F-ino E., Astorp, Svedujo

141. Ancliffe, S-ro J., Scunthorpe, Anglujo

142. Bridger, S-ro H. J., Bexleyheath, Anglujo

143. Chinn, S-ro C. G., Welwyn Garden City, Anglujo

144. Coventry, S-ro W. H., Harpenden, Anglujo

145. Daly, F-ino E. de B., Okehampton, Anglujo

146. Gillett, S-ro R. B., Andover, Anglujo

147. Goldsmith, S-ro C. C., Rickmansworth, Anglujo

148. Goulding, S-ro E. I., Woking, Anglujo

149. Hill, S-ro A., Birmingham, Anglujo

150. Ingham, S-ro H., Liverpool, Anglujo

151. Knight, S-ino E. B., London, Anglujo

152. Robinson, F-ino E., Pickering, Anglujo

153. Thurgood, S-ro F., London, Anglujo
 154. Hamilton, S-ro M. G., Southampton, Anglujo
 155. Crowley, D-ro R. H., Tewin, Anglujo
 156. Alberich-Jofré, S-ro A., Barcelona, Hispanujo
 157. Vidack, S-ro J., Seattle, Wash., Usono
 158. Turner, S-ro G. P., Middleton, Wis., Usono
 159. Latham, S-ro H. E., Caledonia, N.Y., Usono
 160. Taylor, S-ro R. - N., Christchurch, Nov-Zelando
 161. Sly, S-ro K. A., Slough, Anglujo
 162. Bettges, S-ro J., Duisburg, Germanujo
 163. Helfers, S-ro F., Karlsruhe, Germanujo
 164. Berger, S-ro J. G., München, Germanujo
 165. Gerdman, S-ro B., Stockholm, Svedujo
 166. Gustafsson, S-ro K. E., Bergvik, Svedujo
 167. Olsson, S-ro S., Strömsnäsbruk, Svedujo
 168. Coss, S-ino C. L., Burlingame, Cal., Usono
 169. Wolff, F-ino H., San Francisco, Cal., Usono
 170. Geerlings-la-Croix, S-ino M., Amsterdam, Nederlando
 171. Allen-Smith, S-ro H. W., Watford, Anglujo
 172. O'Dell, S-ro J. D., Lincoln, Anglujo
 173. Rudman, S-ro F. C., London, Anglujo
 174. Bastien, Int.-Gen. L., Paris, Francujo
 175. Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo
 176. Broise, S-ro, Longué, Francujo
 177. Friess, F-ino E., Paris, Francujo
 178. Guillaume, S-ro J., Le Vesinet, Francujo
 179. Lemaire, S-ro, Harbonnières, Francujo
 180. Lienhardt, S-ro A., Mulhouse, Francujo
 181. Luez, S-ro D., Laon, Francujo
 182. Marchand, F-ino M., Paris, Francujo
 183. Philipot, S-ino M., Lourdes, Francujo
 184. Ploussu, S-ro A., Grenoble, Francujo
 185. Belinfante, D-ro F. J., Lafayette, Ind., Usono
 186. Brown, S-ro A. L., Washington, D.C., Usono
 187. Dillinger, S-ro H. E., Placerville, Cal., Usono
 188. Dodge, S-ro E. G., Washington, D.C., Usono
 189. Ferree, D-ro G. P., Mill Hall, Pa., Usono
 190. Kovarik, S-ro F. J., Chicago, Ill., Usono
 191. Lowe, S-ro E. W., Kansas City, Mo., Usono
 192. Poehlman, S-ro O., Detroit, Mich., Usono
 193. Solzbacher, D-ro W., Yonkers, N.Y., Usono
 194. Wagner, S-ro G. E., Tampa, Fla., Usono
 195. Cuené, S-ro M., Meknès, Maroko
 196. Vidal, S-ro J., Meknès, Maroko
 197. Maeland, S-ro O., Rjukan, Norvegujo
 198. Smilga, S-ro K., Toronto, Kanado
 199. Halbedl, D-ro A., Knittelfeld, Aŭstrujo
 200. Höfert, S-ro F., Wien, Aŭstrujo
 201. Geerinck, S-ro R., St. Niklaas, Belgujo
 202. Aarsaether, S-ro E., Oslo, Norvegujo
 203. Bugge-Paulsen, Kapt. R., Oslo, Norvegujo
 204. Postl, S-ro A., Döllach, Aŭstrujo
 205. Schmidt, Pastro A., Graz, Aŭstrujo
 206. Barbieri, S-ro R., Montevideo, Urugvajo
 207. Garcia, S-ro R., Montevideo, Urugvajo
 208. Klein, S-ro A., Montevideo, Urugvajo
 209. Zaballos Morales, D-ro R., Fray Marcos, Urugvajo
- DONACIOJ.** G. L. Preedy 12ŝ. 6p., H. Penfold 2ŝ., S-ino L. A. Evans 5ŝ., Ges-roj Houghton 10ŝ., D-ro R. H. Crowley 50ŝ., F-ino H. Steele 5ŝ., F-ino E. McGarvie 5ŝ., H. J. Bridger 42ŝ., G. E. Brown, 8ŝ., G. Prudhon 60ŝ., J. Course 100ŝ., P. Serra 2ŝ., S. de Waal 27ŝ. 6p., L. Apcher 20ŝ., E. G. Dodge 7ŝ., S-ino M. Philipot 4ŝ. 6p., A. Labit 2ŝ., Kilu 2ŝ.
- Sinceran dankon al ĉiu helpanto.**
C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Kio estas via V.-K.?

Respondoj (vidu p. 56)

1. (c) **Fezo** estas Turka ĉapo.
2. (b) **Dieto** estas speciala nutromaniero.
3. (a) **Istmo** estas mallarĝa intermara terkolo.
4. (b) **Jogurto** estas kazeigita lakto.
5. (a) **Kompromiti** estas meti en risko-plenan situacion.
6. (c) **Kronika** signifas longedaŭra (ekz. kronika malsano).
7. (b) **Profilo** estas vizaĝo flanke rigardata.
8. (a) **Oligarkio** estas sistemo de familia regado.
9. (c) **Rigida** signifas nefleksebla.
10. (b) **Skuno** estas dumasta velŝipo.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.

Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.

Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Kaj tiuj, kiuj estis kun mi, vidis ja la lumon, sed ne aŭdis la voĉon de tiu, kiu parolis al mi. Kaj mi diris, Kion mi faru, Sinjoro? *La Aĝoj* 22.9.

Pri bredado de abeloj : A. P. Andersen (Nederlando). Prezo 5ŝil. 6p. Mendu ĉe U.E.A. aŭ ĉe vialanda libroservo.

Izraelo : Avri Salamon, P.O.B.8, KIRYAT-MOTZKIN, interŝanĝas pm. kun ĉiuj landoj.

La "Blanka Lernejo" dankas ĉiujn amikojn kiuj sendis leterojn. Kvankam ne estas eble korespondi kun ĉiuj, ni tamen respondos.

Esperanta grupo deziras interŝanĝi korespondadon kun tutmondo ; "Escola de Esperanto", Caixa Postal 6.000, SAO PAULO, Brazilo.

25 gekursanoj deziras korespondi. Baudat, 20 Route de Lyon, MOULINS (Allier), Francujo.

Homeopatia kuracisto deziras kontaktigi kun ĉiulandaj kolegoj interesataj pri homeopatio. Skribu al D-ro Lecussan, CARBONNE, H.G., Francujo.

Gelernantoj de Popola Lernejo deziras interŝanĝi vidaĵkartojn kun ĉiuj landoj. Nepre respondos. Bonvolu skribi al Klaso IV S, County Primary School, SHERINGHAM, Norfolk, Anglujo.

Esperanto-Asocio de New York kunvenas ĉiumonate. Ĉiuj bonvenaj. Telefonu : BU-4 0963, Dormont.

Haltu momenton kaj skribu al nia leter-vespero, kiu okazos la 25-an de Februaro. Ni estas 12 komencantoj, kiuj deziras korespondi per ilustr. p.k. Ni respondos ĉiujn sendaĵojn. Skribu al "Amikeco", S-ro G. Persson, Berzelius Plats 1, HÅLSINGBORG, Svedujo.

Popollerneja instruista klubo kun ĝiaj gelernantoj (9-15 jaraj) aranĝos leter-vesperon en Aprilo 1952. Adreso : Instr. Herman Noponen, Håmeenink. 31 B 18, TAMPERE, Finnlando.

Senpage tri broŝurojn (Vorto Viva, Fonto de l'Vivo, La religiaj cirkonstancoj en Svedujo; kune 142 paĝoj) sendas "Misia fako de la sveda KELI-sekcio" al ĉiu nesveda sincera petanto. Konigu al ĉiuj

gesamideanoj. Adreso : Kristliga Esperanto-förbundet, Verkmästaregatan 18, ÖREBRO, Svedujo. Menciu ĉi tiun gazeton en via peto.

Deziras ricevi bildetojn de ge-Sanktuloj, taŭgajn por poŝpreĝlibroj, scenojn de la Pasio de Jesu-Kristo, kaj preĝojn, nur kun *esperanta teksto* ; reciproke oni sendos il. pk., kiujn ankaŭ interŝanĝas S-ro Carlos Martinez, Estación Plaza de Armas, Pabellón V.O., SEVILLA, Hispanujo.

S-ro J. Juan Forné, C. Reloj Viejo 5, VALENCIA, Hispanujo deziras korespondi per leteroj aŭ bildkartoj kun svedaj gesamideanoj. Certe respondos.

Grupo de novaj Esperantistoj deziras korespondi kun ĉiuj landoj (precipe Hispanujo kaj Aziaj) pri ĉiuj temoj (precipe mondfederaciaj). Adresu leterojn al : D. Bushaw, 221-A Marshall St., PRINCETON, N.J., Usono.

Tridek Esperanto-gelernantoj deziras interŝanĝi poŝmarkojn, infandeseĝnaĵojn, fotojn k.t.p. Ni estas 10 ĝis 15-jaraj. Kathol. Schule Fley, (21b) Hagen-Fley, Germanujo.

Metallaboristo serĉas korespondadon kun gelaboristoj en ĉiuj landoj per il. poŝkartoj aŭ leteroj precipe pri gelaboristaj viv-kondiĉoj, sindikataj kondiĉoj, k.t.p. Certe kaj tuj respondos. Thomas Henders, (14a) Stuttgart-Feuerbach 1, postlagernd, Germanujo Okcidenta.

Internacia Bonhumoro—la riĉe ilustrita februara numero aperis. Decembro-februaro numeroj haveblaj kontraŭ 4 poŝtrespond-kuponoj, sola specimeno 3 rpk. Strindbergsvej 36, København Valby, Danlando.

Deziras tutmonde interŝanĝi poŝmarkojn, poŝkartojn, leterojn ; respondas ĉiam, S-ro Hernando, 6 Rue Bellevue, Carcassonne (Aude), Francujo.

ATAM,=la nuntempe plej perfekta, praktika aermotoro: ankoraŭ nekonata, nepatentita aparato, povante doni nelimigitan energion. Tutmondaj interesuloj kaj kunhulpantoj, vere komprenantaj gravecon de la eltrovo, turniĝu al S.E.A., Caselpost 58, SASSARI, Italujo.

KRONIKO JAPANA

el Ĉin- kaj Japanlingva originalo tradukis Kyūiti Nohara

(*Vidu la recenzon sur paĝo 50*)

Kvin volumoj papere binditaj, presitaj sur tre bona papero
Entute 818 paĝoj 22×15 cm.

“Vere grava aldono al nia literaturo”

Prezo 25 ŝil. - - - - - Aŭfranko 1ŝ. 6p.

Eldonita de Japana Esperanto-Instituto

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio,

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

Antaŭmendu je
FAVORA PREZO

Baldaŭ aperos

KVAROPO

Poemoj de William Auld, John S. Dinwoodie, John Francis kaj Reto Rossetti; kun antaŭparolo de Prof. Waringhien, tutpaĝa antaŭbildo kaj kvar portretoj. Pli ol 200 paĝoj sur bela papero kun plurkolora kovrilo.

Prezo: 10 ŝil. aŭ 1.50 dol.

Favora prezo ĝis 31 Marto:

7ŝ. 6p. aŭ 1.10 dol. aŭfrankite

Mendu ĉe

“Esperanto en Skotlando”,
23 Ashdale Drive, Glasgow, S.W.2,
Britujo

aŭ ĉe

Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Fine de februaro aperos unika kajero
por 1952 de

SENNACIECA REVUO

56 paĝoj plus ilustrita kovrilo kaj entekstaj bildoj. Originalaj kontribuoj el la plumo de Alings, Baronnet, Bartelmes, Ben Alter, Burnazel, Emba, Laurat, Laval, Lereveld, Mildwurf, Régulo Pérez, Serrano, Szilágyi, R. Schwartz, Olaf Solli, Waringhien, krom kelkaj tradukoj el valoraj aŭtoroj.

Prezo de la kajero, mendebla ĉe ĉiuj
Libroservoj kaj ĉe Perantoj de SAT
200 fr.fr., 4 ŝil., 2 guld., 2.30 DM.,
3 sv.kr., aŭ egalvaloro.